

*Se poser sans s'opposer
S'exposer sans s'imposer*

*Starigi sen kontraŭstari
Elmeti sin sen altrudi sin*

ESPERANTO - 95

Revue trimestrielle
bilingue

Dulingva trimonata
revuo



Abonnement 1 an

Jarabono

6 Ecus

Landoj de la Eŭropa Komunumo : 6 Ekuoj
Aliaj : 7 Ekuoj

ESPERANTO-95
LA BALASTIERE
rue du Brûloir
F 95 000 CERGY
C.C.P./P.C.K. La Source 35 766 17 T

Numéro 13

Numero 13

Dialogo inter surduloj.

Antaŭ nelonge, ni sendis la lastan numeron de *Esperanto-95*, kun kompreneble, enkonduka letero, al pluraj dekoj da eminentuloj (televizaj gazetistoj, bankieroj, egindustriistoj, universitatanoj ...). Neniu el ili, ĝis hodiaŭ, bonvolis respondi, kiel tio estis atendota.

Krom unu, emerita universitatano. Tre malrekte, pere de neŝtata radio, ĉe kiu li prizorgas ĉiun duan semajnon rubrikon pri la franca lingvo.

Citinte nian revuon - pri kio ni dankas lin - kaj rimarkiginte, ke ĝi estas vere dulingva, kun la traduko de ĉiuj tekstoj vid-al-vide, tiu iama profesoro reprenis la formulon, kiu kuŝas en paĝo 19: "Pli bone estas paroli ...", kiun ni metis ĉekapen, en nia letero.

Kaj anstataŭ konsenti pri tio, ĉu li ne sin jetis al senkompata rebato? "Kia pretendo! Kiu do povas kun sukceso paroli artefaritan lingvon? Pri la nenatura balbutado de natura lingvo, kiu kontentiĝas per tio?" Pruve, li citis plurajn el siaj amikoj, kiuj parolas senmanke la anglan! Ni notu, pase, ke tiu honorinda profesoro ne citis sin mem. Ĉu pro modesteco? aŭ ĉu li spertis, ke kontaŭ Brito, li estas malpli senĝena ol francparolante?

La plej spicaĵo en tiu afero estas, ke li vidas la solvon de la komunikproblemo en Eŭropo pere de la ĝeneraligo de ... la latina.

Estas la ĉiama sinteno de tiuj, kiuj pretendas juĝi Esperanton sen la plej malgranda praktika scio kaj kontentiĝas per antaŭjuĝoj. "Konstruita lingvo povas esti nur sen vivo (Léon Daudet). Esperanto estas ne multe pli ol misformita hispana lingvo (Rémy de Gourmont). Krimo (tiel!) farita de D-ro Zamenhof en 1887, Esperanto depruntis siajn radikojn ĉefe de la nederlanda, de la hispana kaj de la itala (Ernest Gaubert).

Bedaŭrinde estas tiaj homoj, kiuj neniam penis plej malmulte por objektive informiĝi, kiuj eniras la amaskomunikilojn, kaj kiujn oni volonte aŭskultas. Kaj nenio ŝanĝis de la momento kiam Louis de Beaufront skribis en *l'Espérantiste* de mardo 1900, paĝon 30: "Vere la atakantoj de nia lingvo estas tre malbone inspiritaj pri la elekto de siaj argumentoj. Ĉiumomente ili prezentas al ni verajn infanaĵojn kiuj pruvas aŭ la nesciadon de l'demando aŭ blindecon, kiun nur malfacile oni povas ne juĝi intenca".

C. Cavalié

Dialogue de sourds.

Il y a un certain temps, nous avons adressé le dernier numéro de *Esperanto-95*, avec bien entendu, une lettre d'accompagnement, à plusieurs dizaines de personnalités de premier plan (journalistes de télévision, banquiers, grands industriels, universitaires ...). Aucune d'elles n'a, à ce jour, daigné répondre, comme il fallait s'y attendre.

Sauf un, universitaire émérite. Très indirectement. Par l'intermédiaire d'une radio libre sur laquelle il tient, tous les quinze jours, une rubrique sur la langue française.

Après avoir cité notre revue - ce dont nous le remercions - et signalé qu'elle était véritablement bilingue, avec la traduction de tous les textes en regard, cet ancien professeur a repris la formule qui figure en page 19 "Mieux vaut parler ..." et que nous avons mise en exergue de notre lettre.

Et plutôt que d'en convenir, ne voilà-t-il pas qu'il s'est livré à une réfutation impitoyable: "Quelle prétention! Qui donc peut parvenir à parler une langue artificielle?" Quant à ânonner artificiellement une langue naturelle, qui s'en tient là? A preuve qu'il a plusieurs de ses amis qui parlent un anglais sans défaillance! Notons au passage, que cet honorable professeur ne s'est pas cité lui-même. Modestie? ou a-t-il fait l'expérience qu'en face d'un Britannique il est moins à l'aise qu'en français?

Le plus piquant de l'affaire, c'est qu'il voit la solution du problème de la communication en Europe dans la généralisation ... du latin.

C'est la sempiternelle attitude de ceux qui prétendent juger l'espéranto sans en avoir la moindre connaissance pratique et s'en tiennent à des préjugés. "Une langue construite ne peut être que sans vie (Léon Daudet), "l'espéranto n'est guère que de l'espagnol déformé (Rémy de Gourmont). "Commis (sic) en 1887 par le Dr Zamenhof, l'espéranto emprunte surtout ses racines au hollandais, à l'espagnol et à l'italien (Ernest Gaubert).

Malheureusement ce sont ces gens-là, qui n'ont jamais fait le moindre effort pour s'informer objectivement qui ont accès aux médias et que l'on écoute volontiers. Et il n'y a rien de changé depuis que Louis de Beaufront écrivait dans *l'Espérantiste* de mars 1900, page 31: "En vérité ceux qui attaquent notre langue sont bien mal inspirés dans le choix de leurs arguments. A chaque instant, ils nous servent de véritables enfantillages qui prouvent ou l'ignorance de la question ou un aveuglement qu'il est assez difficile de ne pas juger intentionnel".

C. Cavalié

CALIXTE forlasis nin

Granda malfeliĉo kune atingis liajn multnombrajn amikojn kaj la esperantan movadon por kiun li plenumis grandan kaj belan taskon kiam la 20 an de Marto, Calixte CAVALIE forlasis nin, ellacigita de tro da laboro. Li estis nur 66 jaraĝa.

Tutatempe, tagdaŭre kaj eĉ nokte li sin dediĉis al Esperanto.

Li ofte diris :

"Mia esperanta tasko estas granda ĝojo sed mi malĝojas antaŭ la laborego farenda por konigi E-on. Mi estas malkontenta pri tia esperanta paroĥismo, kiu multe malfaciligas la malfermon de la lingvo"

Li sukcesis ellabori tiun-ĉi ununuran revuon, pere de kiu multe da homoj malkovris la E. lingvon.

"Dulingva revuo donas la eblon konigi detale la esprimkapablecon de E-o, tion eĉ ne esperantlingvanoj povas rimarki".

Li penis ankaŭ por famigi la lingvon ekster el la movadon kaj tiucele klopodis sukcese ekspozicii la revuon en la *Forum des Halles* ĉe la vido de ĉiuj vizitantoj.

Almenaŭ li estis kontentega pri la fakto ke dank'al li lia urbo OSNY iĝis internacia;

Li modeste fieris :

"Dank'al E-o 40 malsamaj nacioj alvenis al OSNY".

Malgraŭ unuavide severa aspekto, li estis homo tutaĵa : Li havis grandan korecon, li estis tre akceptema kaj lia domo estis malfermita por ĉiuj.

Por konigi esperanton li ankaŭ partoprenis al multaj kunvenoj de asocioj.

Lastan jaron, li montris surstrate per ĉaro "Esperanto", la ĉeston de la lingvo. Li ankaŭ estis invitita de urba radio-eisendo R.G.B. por paroli pri esperanto

Merkrede posttagmeze li instruis esperanton en Ĉerizejo.

Li ankoraŭ partoprenis al multajn kongresojn kaj karavanojn.

CALIXTE nous a quittés

Une grande peine a atteint à la fois ses nombreux amis et le mouvement espérantiste pour qui il réalisa une grande et belle tâche quand le 20 mars Calixte CAVALIE nous quitta, épuisé par trop de travail. Il avait seulement 66 ans.

Tout son temps, de jour et même de nuit, il l'offrit à l'espéranto.

Il disait souvent :

"Mon travail espérantiste est une grande joie mais je suis triste devant le travail immense à faire pour faire connaître l'espéranto. Je suis mécontent de voir l'esprit de clocher chez les espérantistes qui gêne beaucoup l'ouverture de la langue".

Il réussit à créer cette revue unique par laquelle beaucoup de personnes découvrirent la Langue.

"Une revue bilingue donne le moyen de faire connaître en détail les possibilités de l'espéranto, ce que même les non-espérantophones peuvent remarquer".

Il prit soin également de faire sortir la langue du mouvement et dans ce but il réussit à exposer la revue au Forum des Halles à la vue de tous les visiteurs.

Cependant il était très heureux du fait qu' OSNY, sa ville, était devenue internationale grâce à lui.

Il disait avec modestie :

"Grâce à l'espéranto 40 nations différentes sont venues à OSNY".

Malgré un aspect sévère au premier coup d'oeil, il était un tout autre homme. Il avait une grande cordialité, il était accueillant et sa maison était ouverte à tous.

Pour faire connaître l'espéranto il participa à de nombreuses réunions d'associations.

L'année dernière il montra l'existence de la langue par un char "Esperanto" dans la rue. Il fut aussi invité par la radio locale R.G.B. pour parler de l'espéranto.

Le mercredi après midi il donnait des cours d'espéranto à la Cerisaie.

Il participa également à de nombreux congrès et voyages.

Modesta, pudorema, pri sia propra travivado li estis ankaŭ tre diskreta sed oni scias ke ekde sia junaĝo, dum la dua mondmilito, li varbiĝis en la Rezistado kaj aktive partoprenis kun makisanoj al akraj bataloj kontraŭ la okupantoj. Tiuepoke li estis 18 jaraĝa.

Ĉirkaŭ la jaro 1978 li esperantiĝis, verŝajne li malkovris E-on pere de sia profesio : li estis Inspektoro pri telekomunikiloj, sed li vere fervoris pri la lingvo nur kelkajn jarojn poste.

Li rakontis la okazon :

"La unuan fojon kiam mi partoprenis kongreson, kiu estis fervojista, mi havis grandajn malfacilecojn por bone kompreni la prelegantojn. Mi eliris el la kunvena Ĉambrego kaj mi sidis ekstere sur benko tiam mi vidis tre maljunan Germanon, kiu eksidis apud mi. Post mallonga tempo li alparolis al mi per simplaj vortoj, kaj mi tuj tre bone komprenis tion, kion li diris al mi. Kun miro mi ekkonsciis pri la bonega interkompreno pere de Esperanto".

Krome sia E. aktivado li ŝategis rugbeajn matĉojn pri kiuj li kapablis longtempe paroli kun fervorego.

Ni neniam forgesos nian amikon Calixte !

ETO

Modeste, pudique, il était aussi très discret sur sa vie mais l'on savait que dans sa jeunesse, pendant la 2^{ème} guerre, il s'engagea dans la Résistance et participa activement avec les maquisards à de durs combats contre l'occupant. A cette époque il avait 18 ans.

Au environ de 1978 il devint espérantiste, vraisemblablement découvrit-il l'espéranto par sa profession : Il était Inspecteur pour les Radars et Télécommunications mais il ne s'enthousiasma vraiment pour la langue que quelques années plus tard.

Il raconta à quelle occasion :

"La première fois où je participai à un congrès qui était un congrès de cheminots, j'avais grand mal à bien comprendre les conférenciers. Je sortis de la salle de réunion et j'étais assis au-dehors sur un banc lorsqu'un Allemand, très âgé, vient s'asseoir près de moi. Après un court instant il s'adressa à moi avec des mots très simples et je compris, de suite, très bien ce qu'il me disait. Avec étonnement je pris conscience de l'excellente compréhension par l'espéranto".

Hors de son activité espérantiste, il adorait les matches de rugby pour lesquels il était capable de parler longtemps avec grand enthousiasme.

Nous n'oublierons jamais notre ami Calixte !

Michel PETIT

La eminentuloj de la Esperanta Movado.

Gaston Waringhien (1901-1991).

Profesoro Gaston Waringhien (Varengien), kiu ĵus forpasis estas, nekontesteble, la plej eminenta figuro de la Esperanto-Movado de la lasta duonjarcento. Kaj lia kontribuo al nia lingvo en la kampoj plej fundamentaj estas sen ebla komparo.

Gaston Waringhien estis naskita en Lille (Nord-Francio), la 29-an de julio 1901, kie lia patro estis instruisto pri germana lingvo. Lia kariero estis fulmrapida. 19-jara, licenciata pri lingvistiko, agregaciulo kiam 22-jara. Li estas instruisto pri la latina, la greka kaj la franca en Lille. Samtempe, li prizorgas ĉe Radio-Lille regulan rubrikon pri literaturo



En 1939, li estas instruisto en Tours kaj mobilizita kiel Divizia Stab-oficiro pri la ĉifro sekcio.

Militkaptito, li restos en kaptiteco ĝis majo 1945. En 1949, li estas instruisto ĉe la liceo Kakanal en Sceaux (So). Poste, ĉe la Brita Instituto en Parizo. En 1951, li partoprenas en la prilaborado de "Le français élémentaire" (la elementa franca), en la komisiono Gougenheim-Benveniste.

Li tradukas el la angla plurajn verkojn (vidu poste la verkaron). Li kunlaboras al la revuo "Vie et Langage" (Vivo kaj lingvaĵo), same al "Grand Larousse encyclopédique".

Li interesiĝas pri Esperanto kiam 17-jara kaj ekde 1920 (20-jara) komencas korespondadon kun Emile Grosjean-Maupin, alia eminenta vortaristo de nia lingvo.

Li helpas tiun lastan en la kompiladon de la "Plena Vortaro", unulingva vortaro, kiu aperas en 1930 (kaj al kiu li aldonos suplementon en 1954). En 1933, li kunlaboras en la Enciklopedio de Esperanto.

En 1934, li fondas L'Institut français d'espéranto (Franca Esperanto-Instituto), destinita al la organizo de la E-ekzamenoj por la franclingvaj kandidatoj. (Vidu paĝon 22).

En 1937, li estas elektita membro de la Akademio kaj restos en ĝi ĝis la morto, tio, kio starigas rimarkindan rekordon pri longedaŭro. En 1931, li estas Direktoro de la akademia sekcio por la ĝenerala vortaro. En 1963 (kaj ĝis 1979) li estas Prezidanto de tiu Akademio. Intertempe, li estas ĉefredaktoro de literatura revuo, kiun li kreis en 1955, "La Nica Revuo", kies apero daŭris ĝis 1962.

Les grandes figures du mouvement espéranto.

Gaston Waringhien (1901-1991).

Le professeur Gaston Waringhien, qui vient de disparaître, est sans conteste la plus grande figure du mouvement espérantiste de ce dernier demi-siècle. Et sa contribution à notre langue, dans les domaines les plus fondamentaux est sans comparaison possible.

Gaston Waringhien est né à Lille le 29 juillet 1901, où son père était professeur d'allemand. Sa carrière a été fulgurante : à 19 ans licencié es lettres, agrégé à 22 ans, il est professeur de latin, de grec et de français à Lille. En même temps, il tient à Radio-Lille une chronique régulière sur la littérature.

En 1939 il est professeur à Tours et mobilisé comme officier d'Etat-Major de Division (section chiffre).

Fait prisonnier, il restera en captivité jusqu'en mai 1945. En 1949, il est professeur au lycée Lakanal, à Sceaux, puis à l'Institut Britannique, à Paris. En 1951, il participe à l'élaboration du Français élémentaire au sein de la Commission Gougenheim-Benveniste.

Il traduit de l'anglais plusieurs ouvrages (voir plus loin la bibliographie). Il collabore à la revue "Vie et Langage" ainsi qu'au "Grand Larousse encyclopédique".

Il s'intéresse à l'espéranto dès l'âge de 17 ans et dès 1920 (à 19 ans) entreprend une correspondance avec Emile Grosjean-Maupin, autre lexicographe éminent de notre langue.

Il seconde ce dernier dans la composition du "Plena Vortaro", dictionnaire unilingue, qui paraît en 1930, (et auquel il ajoutera un supplément en 1954). En 1933, il collabore à l'Encyclopédie d'Espéranto.

En 1934, il fonde l'Institut français d'espéranto, destiné à l'organisation des examens d'espéranto pour les candidats de langue française (Voir page 22)

En 1937 il est élu membre de l'Académie d'espéranto et le restera jusqu'à sa mort, ce qui constitue un remarquable record de longévité. En 1951, il en est le directeur de la section "vocabulaire général". En 1963 (et jusqu'en 1979) il sera le Président de cette Académie. Entretemps, il est le rédacteur en Chef d'une revue littéraire qu'il a créée en 1955 "La Nica Revuo" (La Revue niçoise) et qui continuera à paraître jusqu'en 1962.

La detalita verkaro, sur la vid-al-vida paĝo vidigas la intencan intelektan aktivecon, kiun prof. Waringhien disvolvis laŭlonge de sia profesia vivo, kaj pluege.

Samopiniante kiel Fontenelle, kiu asertis, ke elfinita lingvo devas havi kvar fundamentajn verkojn: unu gramatikon, unu vortaron, unu metrikon, unu retorikon, pro f. Waringhien klopodis por havigi al nia lingvo la tri unuajn el tiuj verkoj (1).

Lia Gramatiko (*Plena analiza Gramatiko*) (verkita kun la Hungaro Kalman Kalocsay), kvankam kelkfoje kritikata kaj malfavore juĝata pro harfendado, estas referenca verko de tre alta grado... eĉ se ĝia legado ne estas rekomendinda al la komencantoj (al kiuj, cetere, ĝi ne estas destinita).

Lia *Parnasa Gvidlibro* (verkita kunlabore denove kun K. Kalocsay kaj Roger Bernard) estas verko, kiu difinas la regulojn de la versfarado en Esperanto, do verko tre utila al tiuj - kaj ili estas multnombraj - kiuj provas sian lerteco en la malfacila arto de la poezio en tiu lingvo. Prof. Waringhien, cetere, havis altan ideon pri tiu arto kaj asertis, ke Esperanto estos agnoskita (ni ne diras, kiel li "venkos") per ties poezio.

Sed lia nomo restos nedisigeble ligita al tiu leksikografia monumento, kio estas la *Plena ilustrita Vortaro*, kiu faris el Waringhien "la Littré (2) de Esperanto"? (Eĉ se oni parolas plivolonte pri "la PIVo" kaj ne pri "la waringhieno").

Sciinte kunigi unuagradan teamon de kun-aŭtoroj (universitatoj, altnivelaj scienculoj, kaj diversfakaj specialistoj), li disvolvis la *Plenan Vortaron* de Grosjean-Maupin, por fari el ĝi fundamentan verkon kiu estas la referenco, por ĉiuj Esperantoparolantoj pri la vortdemandoj. Oni scias, ke en ĝiaj 1350 paĝoj (kun la suplemento de 1987), ĝi enhavas ĉirkaŭ 15500 radikojn kaj donas la difinojn de preskaŭ 70 000 vortoj.

Tiugrade, ke oni demandas sin ĉu iu kapablos repreni la torĉon kaj fari alian reverkon ĝisdatigitan kaj samvaloran.

Estus neĝuste ne citi ankaŭ lian plenegan vortaron dulingvan Esperanto-francan, per kiu multaj alilandaj vortaristoj inspiriĝas por verki siajn proprajn vortarojn.

Kaj ni kulpus necitante la 5 eseojn, kiujn Prof. Waringhien publikigis, pri demandoj koncerne la literaturon, la lingvistikon, la arton, la religion kaj eĉ, la historion de la E-Movado, kaj kiuj atestas lian vastan kulturon kaj estas por la esperantistaro perfektaj ekzemploj de tio, kio povas - kaj devas - esti bona stilo en Esperanto.

(1) Oni povas konsideri, ke la kvara ekzistas en la "Retoriko" kaj ties suplemento "Elektitaj paroladoj", de prof. Ivo Lapenna. (Vidu nian N-ro 3 (3-an trimestro 1989).

(2) fama franca vortaristo (1801-1881).

Le détail de son oeuvre, sur la page ci-contre, montre l'intense activité intellectuelle que le professeur Waringhien a déployée tout au long de sa vie professionnelle et bien au-delà.

De l'avis de Fontenelle, qui estimait qu'une langue achevée devait posséder quatre ouvrages fondamentaux : une grammaire, un vocabulaire, une métrique, une rhétorique, le prof. Waringhien s'est employé à doter notre langue des trois premiers de ces ouvrages (1).

Sa grammaire (Plena analiza Gramatiko) (composée avec le Hongrois Kalman Kalocsay), bien que parfois critiquée et accusée de byzantinisme, est un ouvrage de référence de premier ordre, ...même si sa lecture n'est pas à recommander aux débutants (auxquels elle n'est d'ailleurs pas destinée).

Son traité de versification (écrit en collaboration, à nouveau avec K. Kalocsay et avec Roger Bernard) est un ouvrage qui fixe les règles de la versification en espéranto et est très utile pour ceux - et ils sont nombreux - qui s'essaient dans l'art difficile de la poésie dans cette langue. Le prof. Waringhien avait d'ailleurs une haute idée de cet art et affirmait que l'espéranto sera reconnu (nous ne disons pas, comme lui "vaincra") par sa poésie.

Mais son nom restera indissolublement lié à ce monument de lexicographie qu'est le Plena ilustrita Vortaro (Dictionnaire complet illustré), qui fait de Waringhien le Littré de l'espéranto (Même si l'on parle volontiers du piv et non du waringhien).

Ayant su s'entourer d'une équipe rédactionnelle de premier ordre (universitaires, scientifiques de haut niveau et spécialistes divers), il développa le Plena Vortaro, de Grosjean-Maupin pour en faire un ouvrage fondamental qui est la référence de tous les espérantophones pour les questions de vocabulaire. On sait que dans ses 1350 pages (avec le Supplément de 1987) il contient environ 15500 radicaux et donne la définition de près de 70000 mots.

A tel point qu'on se demande si quelqu'un sera en mesure de reprendre le flambeau et d'en faire une nouvelle mouture mise à jour et d'égale valeur.

Il serait injuste de ne pas citer également son Grand dictionnaire bilingue Esperanto-français, très complet et dont s'inspirent de nombreux lexicographes étrangers pour composer leurs propres dictionnaires.

Et nous serions coupables de ne pas citer les 5 essais que le prof. Waringhien a publiés sur des questions de littérature, de linguistique, d'art, de religion et même d'histoire du Mouvement espéranto et qui témoignent de sa vaste culture et sont pour les espérantophones des exemples parfaits de ce que peut être et doit être un bon style en espéranto.

(1) On peut considérer que le 4ème existe dans la "Retoriko" et son supplément "Elektitaj paroladoj" (Discours choisis) du prof. Ivo Lapenna. (Voir notre Nro 3 (3ème trimestre 1989).

Esperanto en la lernejo, laŭ gramatikisto.

oooOooo

La verkaro de profesoro Waringhien estas tiom abunda, tiom densa, tiom diversa kaj tiom originala, ke estas tre malfacile elekti specimenon de lia grandega talento. Ni tamen eltiris el lia verko *Lingvo kaj Vivo* tiun pecon, opiniante, ke oni povas trovi en ĝi argumentojn pri la utilo de Esperanto kiel pedagogia ilo. (Tiu teksto estis temo de prelego farita antaŭ instruistoj en Lille dum 1928).

(...) Mi simple diros ke, el mia propra sperto, kiam knabo lernadis Esperanton dum du jaroj, po du horoj ĉiusemajne, ili efektive ĝin scias, kaj ofte parolas ĝin pli flue ol ilia instruisto mem. Kio estus neeblaĵo ĉe iu ajn nacia lingvo.

Permesu al mi, pli detale montri al vi, kiajn servojn tiu instruado povus fari al junaj knaboj por la lernado de sia hejma lingvo. Tio eble ŝajnos al vi paradoksa. Kaj tamen ! Ĉu tio ne estis ĉiam kaj restas la karakterizo de la duagrada instruado, ke tie, dank'al la komparado kun unu fremda lingvo, aŭ latina, aŭ vivanta, la lernantoj akiras pli fundan scion kaj pli bonan komprenon pri la mekanismo kaj strukturo de la franca ? (1). Jen kion oni jam de nun povus fari en la unuagrada instruado, dank'al tiu mirinda ilo, Esperanto.

Kaj ĉi tie mi volas saluti la nomon de modesta, forgesita, sed meritoplena antaŭulo, Jean-Marie Picard, ŝtata instruisto en Beauvais, kiu, en 1911, publikigis ĉe P. Brodard (Coulommiers) lerno-libron de 244 paĝoj, titolitan : *L'Espéranto à l'École* (E. en la lernejo) kun la subtitolo : *Metoda instruado de la franca lingvo per E. Elementa kurso : inter 7 kaj 10 jaroj*. Tiu franca gramatiko, en 1032 paragrafoj, lernigas ĝuste, efike kaj pedagogie la ĉefajn regulojn de tiu malsimpla lingvo, ĉiam apogante sin sur esperantaj ekzemploj, kiuj, per sia logiko kaj klareco, gvidadas la infanon, vekas lian scivolemon kaj instigas lin al propraj esploroj. Sufiĉus nur trafoliumi tiun ĉefverketon de la instruarto, por dokumenti mian tezon. Sed la materio estas tro abunda, kaj mi elektos nur kelkajn signifoplenajn punktojn.

1.- La vortaraj ekzercoj, precipe ĉe la junaj knaboj, estas io malfacila, ĉar ili ne sentas la bezonon serĉi ekz-e la malon de donita vorto, aŭ la

(1) Alia fama pedagogo, Rektoro Boirac uzis tiuteme la faman formulon ; "Esperanto estos la latino de la demokratio" (Noto de Ceceo).

L'espéranto à l'école, vu par un grammairien.

oooOooo

(L'oeuvre du Professeur Waringhien est si abondante, si dense, si diverse et si originale qu'il est bien difficile de fixer son choix sur un échantillon de son immense talent. Nous avons cependant extrait de son ouvrage *Lingvo kaj Vivo* (la langue et la vie) ce passage, pensant qu'on peut y trouver des arguments sur l'intérêt de l'espéranto comme outil pédagogique. (Ce texte a fait l'objet d'une conférence prononcée devant des enseignants à Lille en 1928).

(...) Je dirai simplement, d'après ma propre expérience, que lorsqu'un garçon a appris l'espéranto pendant deux ans à raison de deux heures par semaine, il le sait effectivement et souvent le parle plus couramment que son instituteur même. Ce qui est une impossibilité dans n'importe quelle langue nationale.

Permettez-moi de vous montrer plus en détail quels services un tel enseignement pourrait rendre à de jeunes garçons dans l'apprentissage de leur langue maternelle. Cela vous paraîtra peut-être paradoxal. Et cependant ! Est-ce que cela n'a pas toujours été et ne reste la caractéristique de l'enseignement, du second degré que, grâce à la comparaison avec une langue étrangère, soit le latin, soit une langue vivante, les élèves y acquièrent une connaissance plus approfondie et une meilleure compréhension du mécanisme et de la structure du français ? Voilà ce que l'on pourrait faire dès à présent dans l'enseignement primaire grâce à cet outil merveilleux, l'espéranto.

Et je veux ici saluer le nom d'un modeste précurseur, oublié mais rempli de mérites, Jean-Marie Picard, instituteur public à Beauvais qui, en 1911, a publié chez P. Brodard (Coulommiers), une méthode de 244 pages intitulée *L'espéranto à l'école*, avec le sous-titre *Instruction méthodique du français par l'espéranto - Cours élémentaire entre 7 et 10 ans*. Cette grammaire française en 1062 paragraphes fait apprendre justement, efficacement et avec un sens aigu de la pédagogie les principales règles de cette langue compliquée, en s'appuyant toujours sur des exemples de l'espéranto, qui par sa logique et sa clarté guident l'enfant, éveillent sa curiosité et l'incitent à faire ses propres recherches. Il suffirait de feuilleter ce petit chef-d'oeuvre de l'art d'enseigner pour documenter notre thèse. Mais la matière est trop abondante et je ne choisirai que quelques points significatifs.

I.- Les exercices de vocabulaire, surtout chez les jeunes enfants sont quelque chose de difficile car ils ne ressentent pas le besoin de chercher, par exemple, le contraire d'un mot donné ou l'adjectif correspondant, comme la leçon le leur demande.

(1) Un autre célèbre pédagogue, le Recteur Boirac a employé sur ce thème, la fameuse formule : " l'espéranto sera le latin de la démocratie " (note de Ceceo).

respondan adjektivon, kiel postulas de ili la leciono. Sed kiam oni disponas pri la afiksaro de komparlingvo, oni tuj vekas en tiuj malfortaj spiritoj la allogon de la donitaj ekzemploj, la naivan ĝojon kunlabori al ia vortkonstruado. Estas unu afero diri seke : "Trovu la malojn de *attentif, facile, poli*", ktp.; estas alia afero prezenti al ili la duopojn :

granda = *grand* ; malgranda = petit.
 atenta = *attentif* ; malatenta = ...?
 facila = *facile* ; malfacila = ...?
 gentila = *poli* ; malgentila = ...?
 kontenta = *content* ; malkontenta = ...?

en kiuj la esperantaj vortoj estas kiel atendoŝtonoj, kiuj instigas la serĉemon. Kaj, kiam la tasko estas finita, la infano ne nur trovis la francajn vortojn *inattentif, difficile, impoli, mécontent* ktp., sed li jam ne rigardos ilin kiel simplajn vortojn, li jam sentos, ke ili havas ion komunan ; kaj ne estos tro malfacile al la instruisto komprenigi al li, kio estas prefikso, aŭ rimarkigi, ke pluraj prefiksoj francaj *in-, dif-, mé-*, egalas unu prefikson esperantan, t.e. estas samsignifaj.

2.- Ĉe aĝo iom pli matura, oni povos atingi pli interesajn konstatojn. Vi scias ke, ekde la milito, oni pli kaj il rezignas pri la malnovaj "vortfamilioj", en kiuj la vortoj estis grupigitaj laŭ sia formo ĉirkaŭ naska simpla vorto : tro da membroj el tiuj familioj rompis ĉiajn sencorilatojn kun siaj parencoj, por ke tiu tasko estu utila al franca lernanto. Ekz-e la verbo *hacher* devenas de la substantivo *hache*, sed la du ideoj fariĝis tute fremdaj unu al la alia : kuiristino ne uzas *une hache* por *hacher* legomojn. Nu, estas ne tre facile sentigi tiajn sencdistingojn al junaj infanoj, ĉiam pli frapitaj de la forma parenceco, ol de la senca diferenco. Sed la esperantaj ekvivalentoj tuj ebligas al la plej mallertaj tion ekkonscii :

haki : *couper à la hache* *hacher* : haketi
 hakilo : *hache* *hachoir* : haketilo

kaj la afero estus ankoraŭ pli klara, se oni uzas la modernaj instrumentoj (mueliloj).

Por anstataŭi la malnovaj "vortfamiliojn", oni do nun ekzercas la infanojn grupigi ĉirkaŭ unu ideo ĉiujn vortojn, kiuj sence rilatas al ĝi. Tio estas tre fruktodona peno, sed ofte tro malfacila por la lernantoj, kiuj ne scias, en kia direkto serĉi la vortsatelitojn, nek en kiaj limoj sin teni. La uzo de simpla esperanta vortaro helpus al ili en nekredebla maniero. El la centra ideo *labouner*, la infano iros al *laboureur* kaj *labourage* kaj tie probable haltos. Sed, se li gvidas sin per E., el *plugi* li iros ne nur al *pluganto* kaj *plugado*, sed per *plugilo* li eltrovos *charrue*, per *plugileto* li atingos *hoyau*, per *pluga* li venos al *aratoire*, per *plugebla* li malkovros *arable*, ktp. Kiel praktika rimedo riĉigi la esprimkapablon de knabo ! Kaj ankaŭ kia rimedo okulfrape evidenti la malkoherecon de la franca vorttrezoro, kaj

Mais quand on présente la série d'affixes de la langue de comparaison, on éveille aussitôt dans ces esprits sans vigueur l'attrait des exemples donnés, la joie naïve de collaborer à la construction des mots. Dire sèchement : "Trouvez le contraire de attentif, de facile, de poli, etc est une chose. C'en est une autre de leur présenter les couples :

*granda = grand ; malgranda = petit.
 atenta = attentif ; malatenta = ...?
 facila = facile ; malfacila = ...?
 gentila = poli ; malgentila = ...?
 kontenta = content ; malkontenta = ...?*

dans lesquels les mots en espéranto sont comme des pierres d'attente, qui incitent le goût de la recherche. Et quand le devoir est fini, l'enfant, non seulement a trouvé les mots français inattentif, difficile, impoli, mécontent, etc mais désormais il ne les regardera pas comme de simples mots, il sent déjà qu'ils ont quelque chose de commun ; et il ne sera pas trop difficile à l'instituteur de lui faire comprendre ce qu'est un préfixe ou de lui faire remarquer que plusieurs préfixes français in-, dif-, mé- équivalent à un seul préfixe en espéranto, c'est-à-dire sont synonymes.

2.- A un âge un peu plus avancé, on pourra obtenir des résultats plus intéressants. Vous savez que depuis la guerre (La Grande Guerre, celle de 14-18 ! NDT) on délaisse de plus en plus les "anciennes" familles de mots dans lesquelles les mots sont groupés d'après leur forme autour d'un mot de base simple. Trop de membres de ces familles ont rompu toute relation sémantique avec leurs parents pour que cette tâche soit utile à l'élève français. Par exemple, le verbe hacher provient du substantif hache, mais les deux idées sont devenues tout-à-fait étrangères l'une à l'autre : une cuisinière n'utilise pas une hache pour hacher des légumes. En fait, il n'est pas très facile de faire sentir ces différences de sens à de jeunes enfants, toujours plus frappés par la parenté de forme que par la différence de sens. Mais les équivalents espéranto permettent immédiatement aux plus obtus d'en prendre conscience :

*haki : couper à la hache hacher : haketi
 hakilo : hache hachoir : haketilo.*

et la chose serait encore plus claire si on utilisait les instruments modernes (moulin) (ou mini-hachoirs rotatifs NDT).

Pour remplacer les "anciennes" familles de mots, on exerce donc à présent les enfants à grouper autour d'une idée tous les mots qui sont liés par le sens. C'est un effort très fructueux, mais souvent trop difficile pour les élèves qui ne savent pas dans quelle direction chercher les mots satellites ni dans quelles limites se tenir. L'emploi d'un simple dictionnaire espéranto les aiderait d'une façon incroyable. De l'idée centrale de labourer, l'enfant ira à laboureur et à labourage, et il s'arrêtera là probablement. Mais s'il se guide par l'espéranto, de plugi (laboureur), il ira non seulement à pluganto (laboureur) et à plugado (labourage), mais par plugilo, il découvrira charrue, par plugileto il atteindra hoyau, par pluga, il viendra à aratoire, par plugebla il découvrira arable etc. Quel moyen pratique d'enrichir la capacité d'expression d'un enfant ! Et quel moyen pour rendre évident l'incohérence du vocabulaire français et sa constante

ĝian konstantan alvokon al la latina fonto ! Nenia leciono, farita per la sola franca lingvo, povus igi la faktojn tiel klaraj kaj "parolantaj" al la spirito.

3.- Ne malpli gravaj estas la servoj, kiujn oni povas atendi de E. pri la instruado de la gramatiko. Mi ne bezonas memori al vi, kun kia malfacilo la knabetoj lernas distingi kaj ekkoni la gramatikajn kategoriojn : substantivo, participo, ktp., aŭ la gramatikajn funkciojn : subjekto, predikativo, objekto, ktp. Tiu malfacilo estas tiel ĝenerala, ke en kelkaj svisaj lernejoj, oni elpensis uzon de malgrandaj diverskoloraj kartetoj, kaj provas kutimigi la infanojn meti la substantivojn sur la blujn kartetojn, la verbojn sur la ruĝajn, ktp. Iom primitiva, sed almenaŭ konkreta rimedo, do adaptita al la menso de la infano. Nu, saman konkretan, kaj cetere multe malpli primitivan helpilon proponas al vi E. kiu, per siaj finaj vokaloj, tuj videble kaj sendube klasas la vortojn kiel substantivoj (*domO*), adjektivoj (*belA*), adverboj (*bonE*), ktp. Same, la objekton tuj montras la no-finaĵo (*mi karesas la katoN*). Por knabo, kiu estos akirinta tian lingvon (kaj memoru, kion mi diris pri la kapablo de knabo vere estri Esperanton), por tiu knabo la gramatikaj abstraktaĵoj fariĝos do familiaraj konkretaĵoj, per kiuj li senĝene kaj plezure ludas (*la domo de patro, la patra domo - ŝi bele kantas, ŝia bela kantado*, ktp.), tiel ke li neniam sentos ian heziton pri la klasado de la respondaj vortoj en sia naskiĝa lingvo.

Mi diros eĉ, ke, malgraŭ ĉia ŝajno, la scio de E. helpas lin ankaŭ ĉe la akiro de la ĝusta skribmaniero. La malfaciloj de la franca ortografio venas, almenaŭ por la duona parto, de tio, ke ĝi respegulas gramatikajn apartaĵojn ne plu ekzistantajn en la parolo. La konscio de la esperanta ekvivalento en tiaj okazoj atentigos la infanon pri la ĝusta analizo. Kiam li aŭdos : " *Qu'est-ce ?*", li pensos pri la esperantigo *Kio estas tio ?* kaj tuj ekvidos, ke temas pri tri vortoj - kio evitigos al li la eraron de liaj malpli kleraj kolegoj, kiuj allogite de facila analogio, senzorge skribas *Quesse ?* aŭ eĉ : *Caisse ?*

Jen kelkaj pure pedagogiaj vidpunktoj. Aliajn mi ankoraŭ povus pritrakti, multon mi ankoraŭ povus diri al vi pri la morala valoro de la Internacia Lingvo por la formado de tiuj junaj animoj, aŭ pri ĝia valoro de liberigo el la karcero de la unulingveco kaj unuliteratureco. Sed mi timas trouzi, ĉi-vespere, vian komplezon, kaj fidus vian sciamon, ke vi ne lasos seneŝa mian inviton al la Verda Regno.

Gaston Waringhien
Lingvo kaj Vivo
Estafeto - Eldonisto - La Laguna

évoation de la source latine. Aucune leçon, faite par le français seul ne pourrait rendre les faits aussi clairs et "parlants" à l'esprit.

3.- *Non moins importants sont les services que l'on peut attendre de l'espéranto, pour l'enseignement de la grammaire. Je n'ai pas besoin de vous rappeler avec quelle difficulté les petits garçons apprennent à distinguer et à reconnaître les catégories grammaticales : substantif, participe, etc. ou les fonctions grammaticales : sujet, attribut, complément d'objet etc. Cette difficulté est si générale que dans quelques écoles suisses, on a imaginé l'emploi de petites cartes de différentes couleurs et on essaie d'habituer les enfants à mettre les substantifs sur les cartes bleues, les verbes sur les rouges, etc. Moyen un peu primitif, mais au moins concret, donc adapté à l'esprit de l'enfant. Eh bien ! C'est une aide (pédagogique, comme on dirait aujourd'hui NDT) aussi concrète et beaucoup moins primitive que vous propose l'espéranto qui, par ses voyelles finales, immédiatement, visiblement et sans équivoque classe les mots en substantifs (domO)(maison), adjectifs (belA)(beau), adverbes (bonE)(bien), etc. de même le complément d'objet est indiqué aussitôt par la finale N (mi karesas la katoN : je caresse le chat). Pour un jeune garçon qui aura appris cette langue (et rappelez-vous ce que j'ai dit sur l'aptitude d'un enfant à maîtriser vraiment l'espéranto) pour cet enfant, les abstractions grammaticales deviendront des réalités concrètes familières avec lesquelles il jouera sans contrainte et avec plaisir (la domo de patro (la maison d'un père) ; la patra domo (la maison paternelle, ou d'un père) - si bele kantas (elle chante bien) , sia bela kantado (son -à elle) beau chant), de façon que jamais il n'éprouvera aucune hésitation pour classer les mots correspondants dans sa langue maternelle.*

Je dirai même, que malgré toute apparence, la connaissance de l'espéranto l'aidera pour l'acquisition de la bonne façon d'écrire. Les difficultés de l'orthographe française viennent au moins pour la moitié, de ce qu'elle réfléchit les particularités grammaticales qui n'existent plus dans la conversation. Avoir à l'esprit l'équivalent espéranto, dans ces cas, attire l'attention de l'enfant sur la bonne analyse. Quand il entend : "Qu'est-ce ?", il pense à la forme espéranto Kio estas tio ? et il s'aperçoit aussitôt qu'il s'agit de 3 mots. Ce qui lui évite l'erreur de ses camarades moins instruits qui, attirés par une analogie facile, écrivent étourdiment Quesse ? ou même : Caisse ?

Voilà quelques aspects purement pédagogiques. Je pourrais en traiter d'autres, je pourrais encore dire beaucoup de choses sur la valeur morale de la langue internationale pour la formation de ces jeunes âmes, ou sur son intérêt pour se libérer de la prison du monolinguisme et de la littérature en une seule langue. Mais je crains d'abuser ce soir de votre complaisance et je fais confiance à votre curiosité qui ne laissera pas sans écho mon invitation au Royaume Vert.

Gaston Waringhien
Lingvo kaj Vivo
Estafeto - Éditeur - La Laguna

La sciencaj artikoloj malestas en nia revuo. Tial, por iom varii, ni tuj prezentos unu, freŝdate aperintan en la nefaka gazetaro. Eble iuj el niaj legantoj surprize ekscios, ke Esperanto estas jam en la kosmo ...

Laŭ Heroldo de Esperanto je la 16-a de aprilo 1991.

A. Asteroidoj "Zamenhof" kaj "Esperanto".

Post kiam el la kosma polvo kaj gaso, entenanta la nukleo-sintrigintaj produktoj de pasintaj stelgeneracioj, akumuliĝas nubo ĝis griza maso-denso, tiam ĝi kolapsas sub la influo de l'propra gravito, kaj pro la origina rotacio de la nubo estiĝas giganta disko. Kiam la centra materia bulo estas sufiĉe masiva, kompakta, tiam en ĝia interno ekbrulas la fajro de nuklea kunfandiĝo: estiĝas stelo.

Tia stelo estas ankaŭ nia suno: giganta termo-nuklea reaktoro, estiĝinta antaŭ 4,6 miliardoj da jaroj. Kaj konkrete, ĝi estas tute ordinara stelo, unu el 100 miliardoj da similaj aliaj kun ĉepliaj miliardoj da planedoj, el kiuj kune konsistas nia galaksio, la Lakta Vojo, kiu estas nur unu el multmilionoj da stelsistemoj en la tuta kosmo.

Nia sunsistemo troviĝanta iel meze inter la centro kaj la rando de tiu nia galaksio, konsistas el la suno, el 9 planedoj, cirkulantaj ĉirkaŭ la suno kaj el ties lunoj, cirkulantaj ĉirkaŭ siaj planedoj.

Sed tio ne estas ĉio, kio cirkulas kaj cetere, vakuo en la kosmo inter la steloj ne ekzistas. Krom gasmolekuloj inter planedoj, same kiel ili, centmiloj da "ĉielaj objektoj": polvajaj, grajnecaj, miniaturoplanedoj, planedetoj, t.n. asteroidoj. El tiaj pecoj, eroj kaj kosma polvo cetere konsistas la "majestaj", fame konataj ringoj de l'planedo Saturno.

La plej multaj el tiuj objektoj cirkulas, strange sed fakte, en la zono inter la orbito de la planedoj Marso kaj Jupitero, do en meza distanco de l'suno je ĉ. 550 milionoj da km, t.e. la triobla distanco inter suno kaj tero.

Kompreneble, la astronomoj diversnaciaj malkovras, observas kaj registras en la observatorioj per altkvalitaj teleskopoj la datumojn de tiuj asteroidoj. La rezultoj de tiuj studoj estas publikataj en internaciaj fakaj jurnalaj.

Tiamaniere i.a. estas registritaj la du nomitaj asteroidoj en "MINOR PLANETS CIRCULAR" (Asteroida cirkulero) N-ro 1350 de la 26 jan. 1956, eldonita de la Universitato en Cincinnati, Ohio (Usono).

La teksto (trad.) estas:

"(1421) ESPERANTO = 1936 F.Q. Malkovrita fare de Y. Väisälä la 18-an de marto 1936 en Turku. Nomita omaĝe al la internacia lingvo proponita de L.L. Zamenhof en 1887 por ĝenerala scienca uzado. La aŭtoro uzis la pseŭdonimon 'Doktoro Esperanto'.

Les articles scientifiques dans notre revue sont inexistants. Aussi pour varier un peu, allons-nous en présenter un, paru récemment dans la presse non spécialisée. Peut-être certains de nos lecteurs apprendront-ils avec surprise que l'espéranto est déjà dans le cosmos ...

De Heroldo de Esperanto du 16 avril 1991.

A. Astéroïdes "Zamenhof" et "Esperanto".

A partir de la poussière cosmique et du gaz contenant les résidus nucléaires des générations d'étoiles disparues, se constitue un nuage dense qui, ensuite, se tasse sous l'action de son propre poids et de sa rotation initiale et se transforme en un disque gigantesque. Quand la boule, au centre, est assez dense et compacte, se produit en son sein une fusion nucléaire. Une étoile apparaît.

Notre soleil aussi est une étoile semblable: un réacteur thermo-nucléaire géant, formé il y a 4,6 milliards d'années. Et, en fait, c'est une étoile très ordinaire, l'une des 100 milliards d'autres semblables, avec encore des milliards de planètes, qui ensemble constituent notre galaxie, la Voie lactée, qui n'est qu'un système stellaire parmi les millions qui constituent l'Univers.

Notre système solaire, qui se trouve à peu près au milieu entre le centre et un bord de notre galaxie est constitué par le soleil, 9 planètes tournant autour du soleil et par leurs satellites qui tournent autour d'elles.

Mais cela n'est pas tout ce qui tourne et d'autre part, le vide, dans l'univers, entre les étoiles n'existe pas. Outre les molécules de gaz entre les planètes, comme elles, des centaines de milliers d'"objets célestes": poussières, grains ou corps plus volumineux, jusqu'à des diamètres de dizaines de kilomètres, donc, en définitive, des planètes miniatures, des petites planètes appelées astéroïdes. Ces fragments, particules et poussière cosmique constituent les "majestueux" et très célèbres anneaux de la planète Saturne.

Le plus grand nombre de ces objets tourne, curieusement, mais c'est un fait, dans la zone entre l'orbite des planètes Mars et Jupiter, donc à mi-distance du soleil, à environ 550 millions de kilomètres, c'est-à-dire à une distance triple de celle entre le soleil et la Terre.

Evidemment, les astronomes des différents pays découvrent, observent et enregistrent dans les observatoires, au moyen de télescopes de grande qualité, les données concernant les astéroïdes. Les résultats de ces recherches sont publiés dans les revues spécialisées internationales.

C'est ainsi, qu'entre autres, sont enregistrés les deux astéroïdes connus dans la "MINOR PLANETS CIRCULAR" (= circulaire concernant les astéroïdes) N-ro 1350 du 26 janvier 1956, publiée par l'Université de Cincinnati, Ohio (Etats-Unis).

Le texte (trad.) en est:

"(1421) ESPERANTO = 1936 F.Q. Découvert par Y. Väisälä, le 18 mars 1936 à Turku. Nommé en hommage à la langue internationale proposée par L.L. Zamenhof en 1887 pour un usage général dans les sciences. L'auteur avait utilisé le pseudonyme de Doktoro Esperanto".

Kelkaj astronomiaj datumoj - Quelques données astronomiques

Planedoj (<i>planètes</i>) asteroidoj (<i>astéroïdes</i>)*	Dist. de la suno (<i>Dist. du soleil</i>) en milionoj da km	Cirkulado ĉ. la Suno en jaroj	(<i>révolution autour du soleil en années</i>)	Rapideco en (<i>vitesse en</i>) km/sec	Diametro (<i>diamètre</i>) km
Tero (Terre)	150	1		29,33	12 760
Marso (Mars)	230	1,88		24	6 800
Esperanto *	435	5,48		16	20-50
Zamenhof *	455	5,48		16	10-30
Jupitero (Jupiter)	780	11,86		13	143 700
Saturno (Saturne)	1 427	29,46		9,6	120 700
Urano (Uranus)	2 870	84,02		6,8	47 000
Neptuno (Neptune)	4 496	164,80		5,4	49 200
Pluto (Pluton)	5 946	247,70		4,7	5 000

(1462) ZAMENHOF = 1938 C.A. Malkovrita fare de Väisälä la 6-an de februaro 1938 en Turku. Nomita honore al L.L. Zamenhof (1859-1917), pola kuracisto kaj aŭtoro de la internacia lingvo, Esperanto".

Prof. d-ro Väisälä (1891-1971) estis elstara finna esperantisto, prezidanto de l'Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). Grava kunlaborantino de prof. Väisälä estis L. Oterma".

Leviĝas ja nun la demando: kiom grandaj estas tiuj asteroidoj "Esperanto" kaj "Zamenhof". Nu - tiaj "mezuroj" ja estas ĉiam relativaj. Ekz.: ĉu nia terglobo estas "granda"? Kompare al siaj najbaraj Merkuro kaj Marso, la Tero estas ĉ. duoble pli granda. Aliflanke kompare al la Jupitero, nia Tero estas kvazaŭ nano: Jupitero estas 13-oble pli granda kaj 360-oble pli peza ol la Tero, kaj 1300 tergloboj havus spacon en ĝi. Do pravigas komparo. Delonge estas konate, ke ĉirkaŭ la planedo Marso cirkulas 2 lunoj, nomitaj Fobos kaj Dejmos. Multe pli oni ne sciis pri ili. Sed la 29-an de januaro 1989 Sovet Unio lanĉis spacsondilon por esplori per plej modernaj elektronikaj instrumentoj ĝuste tiujn trabantojn de l'Marso. Jam estas konate, ke ili havas la formon de elipsoidoj kun jenaj mezuroj en malsamaj aksoj:

- * Luno Dejmos: 10 x 12 x 16 km.
- * Luno Fobos: 20 x 23 x 28 km.
- * Aster. Zamenhof: 10 x 30 km.
- * Aster. Esperanto: 20 x 50 km.

Do, tute "sen-signifa" ankaŭ en la kosmo Zamenhof kaj Esperanto ne estas. Kaj ĉar Zamenhof ja estis modesta homo, ankaŭ ni do estu tiaj...

(1462) ZAMENHOF = 1938 C.A. Découvert par Väisälä le 6 février 1938 à Turku. Nommé en hommage à L.L. Zamenhof (1859-1917), médecin polonais et auteur de la langue internationale Esperanto.


Le Prof. Dr. Väisälä (1891-1971) était un espérantiste finlandais éminent. Président de l'Association espérantiste internationale scientifique (ISAE) Une collaboratrice de valeur du prof. Väisälä fut L. Oterma".

La question suivante se pose aussitôt: quelle est la grandeur des astéroïdes "Esperanto" et "Zamenhof"? Ce genre de mesure est toujours relatif. Par exemple est-ce que notre globe terrestre est grand? Comparée à ses voisins Mercure et Mars, la Terre est environ deux fois plus grande. D'autre part, comparée à Jupiter notre Terre est presque naine: Jupiter est 13 fois plus grand et 360 fois plus lourd que la Terre et 1300 globes terrestres y contiendraient à l'intérieur. La comparaison se justifie donc. On sait depuis longtemps qu'autour de Mars tournent deux satellites: Phobos et Deimos. On n'en sait pas beaucoup plus. Mais le 29 janvier 1989, l'Union Soviétique a lancé une sonde spatiale pour explorer au moyen d'instruments électroniques les plus modernes ces satellites de Mars. On sait déjà qu'ils

ont la forme d'ellipsoïdes avec les dimensions suivantes selon des axes inégaux:

- * Deimos: 10x12x16 km.
- * Phobos: 20x23x28 km.
- * Astér. Zamenhof: 10x30 km.
- * Astér. Esperanto: 20x50km.

Par conséquent "Esperanto" et Zamenhof ne sont donc pas "tout à fait insignifiants" dans l'univers. Et puis que Zamenhof était un homme modeste, soyons-le nous aussi ...



B. Kosma mesaĝo en Esperanto.

La plej sensacia entrepreno sur la kampo de l' spacveturado dum la pasintaj 12 jaroj estas tiu de NASA per la spacveturilo "Voyager 2" (Vojaĝanto 2).

Lancita en 1977, la 5-an de decembro en 1988 la sondilo estis direktita per radiofoniaj impulsoj al la oka planedo de nia sunsistemo, Neptuno, 4,3 miliardojn da km. distance de l' Tero.

La sondilo superflugis la 25-an de aŭgusto 1989, je la 6-a horo MET, la nordan poluson de la planedo en alteco de ĉ. 5000 km. Ke "Voyager 2" dum nun pli ol 13 jaroj kaj post vizito de eĉ 3 planedoj daŭre funkcias, estas teknika miraklo, fieriga rezulto de l' homa spirito.

Tiu Usona entrepreno estas ĝis nun la plej sukcesplena ekspedicio de la senpilota spacveturado; ĝi influis per grandioza amaso da fotoj kaj datumoj grave la komprenon pri nia sunsistemo. Entute ĝis nun la sondilo sendis dekmilojn da grandiozaj fotoj al la kontrolcentro en Pasadena (Kalifornio). La listo de la sukcesoj estas longa kaj impresplena. Ekz. la instrumentoj malkovris, esploris kaj sendis perfektajn fotojn pri aktivaj vulkanoj sur la luno Io kaj 3 novaj Jupitero-lunoj. De l' Saturno alvenis grandiozaj fotoj pri la ringoj ĝin ĉirkaŭantaj kaj pri 6 nekonataj lunoj. Pri eĉ 19 novaj lunoj ni scias nun ĉe Urano.

Kaj nelonge post la kurssanĝo direkte al Neptuno, ankoraŭ 1,4 miliardoj de km for de ĝi, "Voyager 2" jam radio-telegrafis la unuajn fotojn pri tiu ekstera planedo kaj pri ĝia plej granda luno Triton. Kaj eĉ pli aktuale: la spacsondilo alflugante Neptunon, for de ĝi ankoraŭ 69 milionojn da km, malkovris trian Neptunan lunon ĝis nun tute nekonatan. Cetere, kvankam la radio-telegrafaj signaloj havas rapidecon de 300 000 km/s, ili estas survoje de la Neptuno al la Tero pli ol 4 horoj.

Ne malpli ol 250 diversfakaj sciencistoj direktis per radioelektronikaj signaloj la sondilon de unu planedo al alia, lerte eluzante ties orbitojn kaj favoran konstelacion, kiel tio estis dekomence pri-kalkulita en ĉiuj detaloj.

Post la preterpaso de l' Neptuno, por la spacveturilo komenciĝos Odiseado tra la Universo. Ĉiujare ĝi malproksimiĝas je 500 milionoj da km, for de nia planeda sistemo; eble iutage ĝi estos altirata, kaptita sekve de l' gravito de iu fora ĉiela korpo, kaj alsurfaciĝos tie. Kaj eĉ por tia kaso NASA zorgis, informis pri tio i.a.:

(Ekstrakta traduko):

OFICEJO DE LA PROJEKTA DIREKTORO:

Gazetara informo 21:

Oficejo por publika informado, Gazetara Sekcio, UN Novjorko:

Resumoj en la gazetara informo de UN, OS/814 - 2-an de junio 1977.

"AL LA KOSMOSPACA KOMITATO RILATE SONBENDMESAĜOJN PER SPACSONDILLO.

En la spacveturilo estos ekipaĵo destinita al la celo transsendi mesaĝojn de la Tero al eblaj ekster-Teraj inteligentaj estaĵoj transe de l' sunsistemo. Laŭ koncernaj projektoj estos sendataj salutoj en multaj lingvoj, muziko reprezentanta diversspecajn

B. Message cosmique en esperanto.

L'entreprise la plus sensationnelle dans le domaine de l'exploration spatiale de ces 12 dernières années est celle de la NASA par le vaisseau spatial "Voyager 2" (Voyageur 2).

Lancé en 1977, le 5 décembre 1988, la sonde a été dirigée par impulsions radio vers la huitième planète de notre système solaire, Neptune, à 4,3 milliards de km de distance de la Terre.

La sonde a survolé le 25 août 1989 à 6 heures MET (heure de l'Europe Centrale - NDT) le pôle nord de la planète, à une hauteur d'environ 5 000 km. Que "Voyager 2" pendant plus de 13 ans à ce jour, et après avoir visité pas moins de 3 planètes, continue à fonctionner, est une prouesse technique, un résultat flatteur pour l'esprit humain.

Cette entreprise nord-américaine constitue jusqu'à présent l'expédition la mieux réussie de la navigation spatiale sans pilote; elle a joué un grand rôle, par la quantité imposante de photos et de données qu'elle a fournies, dans la compréhension de notre système solaire. En tout, jusqu'à présent, la sonde a envoyé des dizaines de milliers de photos magnifiques au centre de commande de Pasadena (Californie). La liste des résultats atteints est longue et impressionnante. Par ex. les instruments ont découvert, exploré et en ont envoyé des photos parfaites, des volcans en activité sur le satellite Io et 3 nouveaux satellites de Jupiter. De Saturne sont parvenues de magnifiques photos des anneaux qui l'entourent et 6 de satellites inconnus. Nous avons même maintenant des renseignements sur 10 nouveaux satellites d'Uranus.

Et peu après le changement de cap en direction de Neptune, alors qu'il en était encore à 1,4 milliard de km de distance, "Voyager 2" a déjà transmis par radio les premières photos de cette planète extérieure (1) et de son plus gros satellite, Triton. Et voici encore plus récent: la sonde spatiale volant vers Neptune, encore éloignée de 69 millions de km a découvert un troisième satellite autour de Neptune, jusqu'à présent totalement inconnu. En outre, bien que les signaux radio aient une vitesse de 300 000 km/s, ils mettent plus de 4 heures pour parvenir de Neptune à la Terre.

Pas moins de 250 scientifiques de disciplines différentes ont contribué à diriger la sonde par signaux radio, d'une planète à l'autre, mettant habilement à profit les orbites de ces dernières, ainsi qu'une constellation propice, comme tout avait été calculé au départ, dans les moindres détails.

Après avoir dépassé Neptune, commencera pour le vaisseau spatial l'Odyssée à travers l'Univers. Chaque année, elle s'éloignera de 500 millions de km de notre système planétaire. Peut-être un jour sera-t-elle attirée, captée par l'attraction d'un corps céleste lointain et s'y posera-t-elle. La NASA s'est même soucieuse de cette hypothèse. Elle a donné des informations à ce sujet, entre autres:

(Traduction partielle): BUREAU DU DIRECTEUR DE PROJET. Information à la presse 21;

Bureau d'information du public, section de la presse, ONU New-York

Résumés de l'information à la presse, de l'ONU.

OS/814 - 2 juin 1977 "AU COMITE DE L'ESPACE, CONCERNANT LES MESSAGES ENREGISTRES EMIS PAR SONDE SPACIALE.

Dans le vaisseau spatial, il y aura un équipement ayant pour but la transmission de messages de la Terre à de possibles êtres extra-terrestres intelligents, au-delà du système solaire. Selon les projets concernés seront envoyés des salutations en de nombreuses langues, de la musique représentant des cultures et des périodes di-

(1) Extérieure au système solaire, connu des Anciens, mais évidemment pas extérieure au système solaire !...)

kulturojn kaj periodojn, naturaj sonoj de la Tero kaj diĝitaj informoj.

Jen la ekstrakta traduko de la informo aperinta la 3.VI.1977 en "New York Times": "Se ekzistas inteligentaj estaĵoj ekster la sunsistemo, Unuigintaj Nacioj lanĉas mesaĝon por ili. Estas kvazaŭ enbotela mesaĝo al ekster-Teruloj, se tiaj ekzistas kaj uzas ekkone la ŝancon" - diris T. Ferris de la NASA al UN, motivigante internaciajn salutojn. La registritajn mesaĝojn sendis 12 membroj de la komitato de UN. I.a. la franca delegito recitis poemon de Baudelaire [Bodler], Ralph L. Harry, la delegito de Aŭstralio prezentis siajn salutojn en Esperanto ...

Kaj jen la teksto: "Amikoj, mi parolas al vi el la planedo Tero. Mi reprezentas la landon Aŭstralion, la insulan kontinenton en la suda hemisfero de nia planedo. Ni strebas vivi en paco kun la popoloj de la tuta mondo, de la tuta kosmo, kaj labori kun ili por la komuna bono de ĉiu viva estaĵo. Mi salutas ĉiun, kiu komprenas. Adiaŭ".

Nu, ni vidu kaj estu iom paciencaj. Povas ja pasi kelkaj milionoj da jaroj ...

Intertempe, la Vojaĝanto 2 daŭrigas sian vojaĝon en la "senfinitecon". La energia provizo de ĝia nuklea mini-reaktoro sufiĉos ĝis la jaro 2020. Maljam en la neimagebla fora jaro 20 319 la kosma Vojaĝanto atingos la najbaran stelon de nia Suno. "Proksima Centaŭri". Ĉu tiam la Tera mesaĝo renkontos deĉifronton? ...

- o - o - o - o - o - o - o - o - o - o -

Diroj de iluminito

La gravaĵo ne estas, ke ĉiuj interkompreniĝas. La gravaĵo estas, ke la profesoroj pri lingvoj, tiuj, kiuj aranĝas lingvajn restadojn, la konferencaj interpretistoj kaj ĉiuj, kiuj vivas dank' al lingvafero havu karieron sen problemoj.

Ceceo



Desegnaĵo de Chaval

diverses, des sons naturels de la Terre et des informations digitales.

Voici la traduction résumée de l'information parue le 3 juin 1977 dans le New York Times: "S'il existe des êtres intelligents hors du système solaire, les Nations Unies leur lancent un message. C'est presque "une bouteille à la mer" à des extra-terrestres, s'il en existe et savent en tirer parti, a déclaré T. Ferris, de la NASA à l'ONU, motivant ainsi des salutations internationales. 12 membres du comité de l'ONU ont envoyé des messages enregistrés. Entre autres, le délégué français recita un poème de Baudelaire, Ralph L. Harry, le délégué de l'Australie, présenta ses salutations en espéranto..."

En voici le texte: "Amis, je vous parle depuis la planète Terre. Je représente le pays (nommé) Australie, continent insulaire de l'hémisphère sud de notre planète. Nous nous efforçons de vivre en paix avec les peuples du monde entier, de tout l'univers, et de travailler avec eux pour le bien de tous les êtres vivants. Je salue celui qui me comprendra. Adieu!"

Maintenant, voyons et soyons un peu patients. Il peut fort bien se passer quelques millions d'années ...

Entretemps, Voyager 2 continue son voyage dans "l'infini". La provision d'énergie de son mini-réacteur nucléaire suffira jusqu'en l'an 2020. Au cours de l'année inimaginablement lointaine 20319 le voyageur de l'espace atteindra l'étoile voisine de notre soleil "Proxima Centauri". Le message terrestre trouvera-t-il alors un déchiffreur? ...

- o - o - o - o - o - o - o - o - o - o -

Propos d'un illuminé

L'important n'est pas que tout le monde se comprenne. L'important est que les professeurs de langues, les organisateurs de séjours linguistiques, les interprètes de conférence et tous ceux qui vivent du langage business aient une carrière sans aléas.

Ceceo



Dessin de Chaval

Historiaj signiloj de la Esperanta Movado.

Antaŭ cent jaroj. 1892.

La esperantisto daŭre aperas, dank'al la malavareco de W.H. Trompeter, kiu iĝas kuneldonanto, kun Zamenhof.

La formato estas reduktita kaj transiras al 17cmx24 cm. La paĝnombro transiras de 8 al 16. Le jara abonprezo estas reduktita kaj de 3 F. transiras al 2 francoj (= Marko kaj 20 pfenigoj aŭ 80 kopekoj).

Nova rubriko aperas : la nomo de novaj esperantistoj : la scipovo de Esperanto tiam, ne estis hontinda malsano, kiun, hodiaŭ kelkaj klopodas por trompaŝi...

- Apero de la unua lernolibro en la franca (traduko far L. de Beaufront de la libro de Zamenhof : *Universala lingvo Esperanto. Plena lernolibro kun du vortaroj.*

Antaŭ 75 jaroj. 1917.

La esperantista komunumo, jam afliktita de la Mondmilito, kiu dezertigas Eŭropon per fajro kaj glavo funebras ne atendite : pro la forpaso de la kreinto de Esperanto. Doktoro L.L. Zamenhof mortas en Varsovio (Rusio) la 14-an de aprilo 1917, 57-jara, elĉerpita de laborplena kaj mankoplena vivo.

Antaŭ 50 jaroj. 1942.

La revuo *Esperanto*, de UEA ĉesas aperi kun la numero 992 de Aprilo/junio 1942.

Antaŭ 25 jaroj. 1967.

- Forpaso de Johannes R.G. Isbrucker.

Elektrista inĝeniero. Vicedirektoro de la supera teknika lernejo de Hago.

Elektita prezidanto de la Akademio de Esperanto en 1949 (li restos ĝis 1963), li reorganizis tiun institucion. Eminentulo de la Movado en Nederlando.

- Apero de - *Pri Arto kaj Morto*, de Masao Miyamoto.

- *Soleca*, de Victor Catala. Romano tradukita de la katalana far J. Ventura.

- *Norda Naturo*, de Hilda Dresen.

- FIAT produktas filmon en Esperanto, por prezenti sian novan modelon, FIAT 124.

Points de repère historiques du Mouvement Espéranto.

Il y a cent ans. 1892.

La Esperantisto continue de paraître, grâce à la générosité de W. H. Trompeter qui en devient co-éditeur, avec Zamenhof.

Le format en est réduit et passe à 17cm x 24 cm. Le nombre de pages passe de 8 à 16. Le prix de l'abonnement annuel est réduit et de 3 F. passe à 2 francs (= 1 Mark et 60 pfenigs ou 80 kopeks).

Une nouvelle rubrique apparaît : le nom des nouveaux espérantistes : la connaissance de l'espéranto n'était pas alors la maladie honteuse que certains, aujourd'hui s'efforcent de dissimuler ...

- Parution du premier livre d'enseignement de l'espéranto en français (traduction par L. de Beaufront du livre de Zamenhof : *Langue Internationale Esperanto. Méthode complète. Avec deux dictionnaires.*

Il y a 75 ans. 1917.

La communauté espérantophone déjà éprouvée par la Grande Guerre qui met l'Europe à feu et à sang est plongée dans un deuil inattendu : la disparition du créateur de l'Espéranto. Le docteur L.L. Zamenhof meurt à Varsovie (Russie) le 14 avril 1917 à 57 ans, épuisé par une vie de labeur et de privations.

Il y a 50 ans. 1942.

- La revue *Esperanto*, de UEA cesse de paraître avec le numéro 992 d'avril/juin 1942.

Il y a 25 ans. 1967.

- Mort de Johannes R.G. Isbrucker.

Ingénieur électricien. Vice-directeur de l'École technique supérieure de la Haye. Elu président de l'Académie d'Espéranto en 1949 (il le restera jusqu'en 1963) il réorganisa cette institution. Grande figure du Mouvement aux Pays-Bas.

- Parution de - *Pri Arto kaj Morto*, de Masao Miyamoto.

- *Soleca*, de Victor Catala. Roman traduit du catalan par J. Ventura.

- *Norda naturo*, de Hilda Dresen.

- FIAT réalise un film en espéranto pour présenter son nouveau modèle la FIAT 124.

Miksajoj.

Jen amuza fantaziaĵo de la apotekisto-humoristo Alphonse Allais [Alfons Ale] (1854-1905).

LA SENDORMA NOKTO DE RUĜA HUSARO

oooOooo

Mi ĉiam demandis min kial oni nomas "blankaj noktoj" tiujn, kiujn oni trapasas ekstere de sia lito (1). Mi jus trapasis unu, kaj mi trovis ĝin pliguste ... verda.

Tio, kio tamen ne malhelpis mian pordiston, kiam mi rehejmeniris matene, saluti min, farante mienon kvazaŭ li pensus :

Ha ! Ha ! mia knabego ! jen senzorga vivo !

Tamen ! Sed ni ne antaŭrakontu !

Mi devas diri al vi, ke mi de kelka tempo estis amoplena.

Ho ! amoplena, vi scias ... ne morteme. Sed tamen iom kaptita.

Estis blondulino tre afabla kun frizaĵoj sur la tuta frunto. Ŝi estiĝen la daŭro de tutaj horoj ĉe la fenestro, kiam mi preterpasadis.

Longe preterpasante ire kaj ree, mi estis opiniinta finfine, ke ŝi rekonas min, kaj mi faris al ŝi rideton. Eĉ mi imagis al mi - vi scias kiel oni faras al si ideojn - ke ankaŭ ŝi ridetis al mi .

Estis eraro, mi de tiam havis la pruvon, bedaŭrinde tro malfrue.

Mi diris al mi : " Mi iam devos iri vidi tion".

Intertempe, mi informiĝis, lerte, kvazaŭ farante nenion.

Ŝi estas adziniĝinta al sinjoro nefacila, laŭŝajne, Direktoro de grava fabriko de civilaj pafilmasinoj (2). La nefacila sinjoro eliras ĉiuvespere ĉirkaŭ la oka, iras al sia rondo, kaj ~~rehejmenigas~~ nur tre malfrue dumnokte. ^{rehejmenigas}

Bone ! mi diris al mi. Estas tio, kio konvenas al mi.

Ni estis en tempo de kare smomezo (3). Okaze de tiu festo, mi estis invitita al balo inter amikoj, kostumbalo, kompreneble.

Oni scias, ke mi havas multon da imago : tial ĉiuj amikoj diris al mi : "provu trovi amuzan balkostumon."

Kaj mi maskovestis ekde la mateno en Monakan ruĝan husaron.

Vi diros al mi, ke ne estas ruĝaj husaroj en Monako, ke eĉ tute ne estas husaroj en Monako, aŭ se estas, ili ĝenerale vestas sin civile.

Mi scias tion tiel bone kiel vi. Sed ĉu la fantazio ne praviga s ĉiujn malverajetojn ?

(1) La vortludo de la franca titolo estas, kompreneble, ne tradukebla. Sed tamen oni povas trapasi "blankan nokton" (sendorman) en la propra lito ...

(2) Tiuj armiloj ekzistas nur en la ~~manĝo~~ de la humoristo ...

(3) Nekristanaj legantoj, bv legi la PIV por kompreni la sekvon .

Mélanges.

Voici une amusante fantaisie du pharmacien humoriste Alphonse Allais (1854-1905).

LA NUIT BLANCHE D'UN HUSSARD ROUGE.

oooOooo

Je me suis toujours demandé pourquoi on nomme nuits blanches celles qu'on passe hors de son lit. Moi, je viens d'en passer une, et je l'ai trouvée plutôt ... verte.

Ce qui n'a pas empêché mon concierge, quand je suis rentré le matin, de me saluer d'un petit air ... en homme qui dit :

- Ah! Ah! mon gaillard, nous nous la coulons douce !

Et pourtant ... Mais n'anticipons pas.

Il faut vous dire que j'étais amoureux depuis quelque temps.

Oh! amoureux, vous savez!... pas à périr. Mais enfin légèrement pincé, quoi!

C'était une petite blonde très gentille, avec des frisons plein le front. Tout le temps elle était à sa fenêtre, quand je passais.

A force de passer et de repasser, j'avais cru à la fin qu'elle me reconnaissait, et je lui adressais un petit sourire. Je m'étais même imaginé - vous savez comme on se fait des idées - qu'elle me souriait aussi.

C'était une erreur, j'en ai eu la preuve depuis, mais trop tard malheureusement.

Je me disais : " Faudra que j'aie voir ça un jour."

En attendant, je m'informe, habilement, sans avoir l'air de rien.

Elle est mariée avec un monsieur pas commode, paraît-il, directeur d'une importante manufacture de mitrailleuses civiles.

Le monsieur pas commode sort tous les soirs vers huit heures, se rend à son cercle et ne rentre que fort tard dans la nuit.

"Bon, me dis-je, c'est bien ce qu'il me faut."

Nous étions dans les environs de la Mi-Carême.

A l'occasion de cette solennité, j'avais été invité à un bal de camarades, costumé naturellement.

On sait que j'ai beaucoup d'imagination ; aussi tous les amis m'avaient dit : "tâche de trouver un costume drôle."

Et je me déguisai, dès le matin, en hussard rouge de Monaco.

Vous me direz qu'il n'y a pas de hussards rouges à Monaco, qu'il n'y a même pas du tout de hussards, ou que, s'il y en a, ils sont généralement en civil.

Je le sais aussi bien que vous, mais la fantaisie n'excuse-t-elle pas toutes les inexactitudes ?

Tout en me contemplant dans la glace de mon armoire (une armoire à glace), je me disais : " Tiens, mais ce serait véritablement l'occasion d'aller voir ma petite dame blonde. Elle n'aura rien à refuser à un hussard rouge d'aussi belle tournure."

Dum mi plezure rigardadas min en la spe-
gulo de mia ŝranko (spegulŝranko), mi diradis al mi :
"jen ! Estus vere la okazon viziti mian blondan
sinjorineton. Ŝi povos nenion rifuzi al ruĝa husaro
en tiaj ornamvestoj".

Fakte, inter ni, mi bele aspektis en tiu kostu-
mo. Ege bele eĉ.

Mi frue vespermanĝas Per bona manĝo,
riĉhava por fortigi min, priverŝita per bonkvalita
vino, por igi min aplomba.

Mi bukas mian portepeon, ĉar mi havis sa-
bron, kiel konvenas, kaj jen mi estas atakpreta.

Alvenante apud la domo de mia adoratino, mi
ekvidas la edzon eliranta.

Bone ! ĉio iras glate. Mi lasas lin malproksim-
igi kaj supreniras la ŝtuparon, malrapide pro la
spronoj, al kiuj mi ne estas bone al kutimiĝinta kaj
kiuj estas iom longaj ĉe la ruĝaj husaroj.

Mi tiras la piedon de kompatinda cervino kiu
nun utilas por tirilo de sonorileto.

Paŝeto aŭdiĝas malantaŭ la pordo. Oni mal-
fermas. Estas ŝi. Mia blondulineto. Mi diras al ŝi...

Fakte mi demandas min kion mi diris al ŝi ...

Ĉar, vi scias, en tiuj momentoj oni diras ĉion,
kio al vi venas en la kapon, kaj kvin minutojn
poste, vi ne povas ripeti eĉ se oni pendas vin.

Sed tio, kion mi bone memoras estas tio, kion
ŝi respondis furiozmiene : " Vi estas freneza, sin-
joro kaj mia edzo tuj rehejmeniĝos. Jen ! mi aŭdas
lin".

Kaj klak ! ŝi jetfermas la pordon antaŭ mia
nazo.

Fakte, iu supreniris la ŝtuparon per pezaj
paŝoj, la terurega paŝo de la senkompata edzo.

Kvankam mi estas ruĝa husaro, mi konfesas,
ke mi ektimis.

Estis tre simpla rimedo eliri tiun situacion,
vi diros al mi. Malsupreniri la ŝtuparon kaj foriri,
senruze. Sed kiel rimarkigis angla filozofo, estas la
plej simplaj ideoj kiuj venas la lastaj.

Mi pensis pri ĉio, krom foriri.

Unu temperon, mi havis la ideon malingigi
kaj atendi la edzon sentime. "Absurda, mi pensis,
kaj kompromita".

Kaj la viro daŭre supreniris.

Subite, mi ekvidis pordon, kiun mi ne rimar-
kis unuatempe, ĉar ĝi estas farbita kiel la ceteraĵo
de la koridoro marmoraŝajne. Sed kia stranga mar-
moro ! Vera karnavala marmoro !

En tiuj momentoj, oni ne havas tempon por
perdi pri frivola estetiko.

Mi malfermas la pordon kaj impetege mi
enŝoviĝas eĉ sen demandi al mi kien mi eniras.

Urĝis ! La edzo estis supre de la ŝtuparo.

Mi aŭdas la knaradon de ŝlosilo en seruro,
pordon kiun oni malfermas, pordon kiun oni fer-
mas - la samon verŝajne - kaj fine mi povas spiri.

Mi pensas tiam ekzameni la ejon kie mi tro-
vis la savon.

Mi vetas, ke neniam mi divenos la strangan
lokon kien mi enŝoviĝis.

Vi ridetas ... Do vi divenis.

Jes ! ja estis tie, aŭ pli ĝuste estis TIE CI !

*Le fait est, entre nous, que j'étais très bien
dans ce costume. Pas mal du tout même.*

*Je dîne de bonne heure... Un bon dîner, subs-
tanciel, pour me donner des forces, arrosé de vin
généreux, pour me donner du ... toupet.*

*Je boucle mon ceinturon, car j'avais un sabre,
comme de juste, et me voilà prêt pour l'attaque.*

*En arrivant près de la maison de mon adorée,
j'aperçois le mari qui sort.*

*Bon, ça va bien ... Je le laisse s'éloigner et je
monte l'escalier, doucement, à cause des éperons
dont je n'ai pas une grande habitude et qui sont un
peu longs chez les hussards rouges.*

*Je tire le pied d'une pauvre biche qui sert main-
tenant de cordon de sonnette.*

*Un petit pas se fait entendre derrière la porte.
On ouvre... C'est elle ... ma petite blonde. Je lui dis ...*

Au fait, qu'est-ce que j'ai bien pu lui dire ?

*Parce que, vous savez, dans ces moments-là,
on dit ce qui vous vient à l'esprit, et puis, cinq mi-
nutes après, on serait bien pendu pour le répéter.*

*Mais ce que je me rappelle parfaitement, c'est
qu'elle m'a répondu, d'un air furieux : " Vous êtes
fou, Monsieur !... Et mon mari qui va rentrer ...
Tenez, je l'entends."*

Et vlan ! Elle me claque la porte sur le nez.

*En effet, quelqu'un montait l'escalier d'un pas
lourd, le pas terrible de l'époux impitoyable.*

*Tout hussard rouge que j'étais je l'avoue, j'eus
le trac.*

*Il y avait un moyen bien simple de sortir de la
situation, me direz-vous. Descendre l'escalier et
m'en aller, tout bêtement. Mais comme l'a très bien
fait remarquer un philosophe anglais, ce sont les
idées les plus simples qui viennent les dernières.*

Je pensais à tout, sauf à partir.

*Un instant j'eus l'idée de dégainer et d'atten-
dre le mari de pied ferme. "Absurde, me dis-je, et
compromettant."*

Et l'homme montait toujours.

*Tout à coup, j'avise une petite porte que je
n'avais pas remarquée tout d'abord, car elle était
peinte, comme le reste du couloir, en imitation de
marbre, mais quel drôle de marbre ! Un vrai mar-
bre de Mi-Carême.*

*Dans ces moments-là, on n'a pas de temps à
perdre en frivole esthétique.*

*J'ouvre la porte, et je m'engouffre avec fré-
nésie sans même me demander où j'entre.*

*Il était temps ! Le mari était en haut de l'es-
calier.*

*J'entends le grincement d'une clef dans la ser-
rure, une porte qui s'ouvre, une porte qui se ferme
- la même sans doute - et je puis enfin respirer.*

*Je pense alors à examiner la pièce où j'ai trou-
vé le salut.*

*Je vous donne en mille à deviner le drôle
d'endroit où je m'étais fourré.*

Vous souriez ... Donc vous avez deviné !

Eh bien ! oui, c'était là, plutôt ... ICI !

*Doucement, sans bruit, je lève le loquet et je
pousse la porte ... Elle résiste.*

Je pousse un peu plus fort ... Elle résiste encore.

*Je pousse tout à fait fort, avec une vigueur sur-
humaine. La porte résiste toujours, en porte qui a
des raisons sérieuses pour ne pas s'ouvrir.*

Malrapide, senbrue, mi levas la klinkon kaj puŝas la pordon ... Ĝi rezistas.

Mi puŝas iom pli forte. Ĝi ankaŭ rezistas.

Mi puŝas fortege per superhoma energio. La pordo rezistas senĉese, kiel pordo kiu havas gravajn kaŭzojn por ne malfermi sin. Mi diras al mi : " La malsekeco ŝveligis la lignon. Mi firme piedapogas kontraŭ... la umo kaj ... ruk ! Vana peno.

Vere, estas bona lignaĵo.

Diabla ideo venas en mian kapon. Se la edzo, ekvidinte min de malsupre kaj diveninte miajn kulpajn projektojn estus enfermiĝinta min tie, dank'al ekstera riglilo !

Kia situacio por ruĝa husaro !

Karesmomezan vesperon ! kaj oni atendas min en la balo !

Ne, ne, ne eblas . mi repuŝas for de mi tiun penson.

Kaj tamen la pordo restas nemovebla kiel roko.

Fine, laca pro la kontraŭstarado, mi sidiĝas - feliĉe oni povas sidiĝi en tiuj lokoj - kaj atendas. Mil diabloj ! iu ja venos malliberigi min.

Oni ne venas rapide ... Eĉ oni tute ne venas.

Kion do ili manĝas en tiu domo ?

Ĉidonikonfitaĵojn, verŝajne.

El la strato suprenvenas al miaj oreloj la gaja bruego de la hupoj, de la ĉaskornoj, klarionoj kaj ankaŭ - terure - la sono de la horloĝoj, la kvaronoj, la duonoj, la horoj !...

Kaj la atendita liberigonto ne venas. Ĉu ĉiuj homoj satiĝis je bismuto hodiaŭ ?

La venontan fojon, kiam mi revenos en tiun domon, mi sendos melonon al ĉiu loganto.

De tempo al tempo, kun kortuŝa malespero, mi stariĝas kaj kolektante mian tutan energion, mi puŝas la pordon. Mi puŝas, puŝas !

Ha ! vere bonega pordo ĝi estas !

Finfine, elĉerpita, mi rezignas la lukton. La tenilo de mia sabro eniras en miajn ripojn. Mi al kroĉas ĝin je la klinko kaj ekdormas.

Peniga dormo, interrompita de premsonĝoj . La stratbruo iom post iom estingiĝis. oni aŭdas nur ĉaskornon, kiu obstinas heroe en la foraĵo.

Poste la ĉaskorno iras enlitiĝi kiel la aliaj.

Mi vekigiĝas. Jam ektagiĝas. mi frotas la okulojn kaj memoras ĉion. Mia tuta ruĝhusara sango ekbolas.

Furiozege, mi malkroĉas mian sabron kaj tiras ĝin al mi.

Mi ne kuraĝas diri al vi la restaĵon.

Stultulo mi estas ! duobla stultulo ! triobla stultulo ! centobla idioto ! milobla cretino !

Mi estis trapasinta mian tutan nokton forpuŝante la pordon !

Ĝi malfermiĝis internen !

Alphonse Allais
Pas de bile (ne maltrankviliĝu) (1893)

Je me dis : " C'est l'humidité qui a gonflé le bois." Je m'arc-boute contre le ... machin, et ... han ! Peine perdue.

Décidément, c'est de la bonne menuiserie.

Une idée infernale me vient ... Si le mari, m'ayant aperçu d'en bas et devinant mes coupables projets, m'avait enfermé là, grâce à un verrou extérieur !

Quelle situation pour un hussard rouge !

Un soir de Mi-Carême ! et moi qu'on attend au bal !

Non, non, ce n'est pas possible. J'éloigne de moi cette sombre pensée.

Et pourtant, la porte reste immuable comme un roc.

De guerre lasse, je m'assieds - heureusement qu'on peut s'asseoir dans ces endroits-là - et j'attends. Parbleu ! quelqu'un viendra bien me délivrer.

On ne vient pas vite ... On ne vient même pas du tout.

Que mangent-ils donc dans cette maison ?

Des confitures de coing, sans doute.

De la rue monte à mes oreilles le joyeux vacarme des trompes, des cors de chasse, des clairons, et puis - terrible - le son des horloges, les quarts, les demies, les heures ...!

Et le libérateur attendu n'arrive pas. Tous ces gens-là se sont donc gorgés de bismuth aujourd'hui ?

La prochaine fois que le reviendrai dans cette maison, j'enverrai un melon à chaque locataire.

De temps en temps, avec un désespoir touchant, je me lève, et, faisant appel à toute mon énergie, je pousse la porte, je pousse, je pousse !

Ah ! pour une bonne porte, c'est une bonne porte !

Enfin, épuisé, je renonce à la lutte. La poignée de mon sabre me entre dans les côtes. Je l'accroche au loquet et je m'endors. Sommeil pénible, entrecoupé de cauchemars. Le bruit de la rue s'est éteint peu à peu. On n'entend plus qu'un cor de chasse qui s'obstine héroïquement dans le lointain.

Puis le cor de chasse va se coucher, comme tout le monde...

Je me réveille !... C'est déjà le petit jour. Je me frotte les yeux et me rappelle tout. Mon sang de hussard rouge ne fait qu'un tour. Rageusement, je décroche mon sabre et le tire à moi...

Je n'ose pas vous dire le reste.

Imbécile que j'étais ! Double imbécile ! triple imbécile ! centuple idiot ! milluple cré"tin ! J'avais passé toute ma nuit à pousser la porte ...

Elle s'ouvrait en dedans !...

Alphonse Allais
Pas de bile (1893)

MOTS-CROISES TRES FACILES

- o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o -

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2								■		
3					■		■			
4										■
5			■						■	
6					■			■		
7										
8		■				■				
9							■			
10										

Horizontalement :

- 1.- Une dactylo (1 radical + 2 suffixes).
- 2.- Energique.- Préfixe qui indique le commencement d'une action.
- 3.- Forme abrégée de *tirage d'une loterie* (suppression de "ado") ou de *lot* (suppression de "ajo").- Grand-père.
- 4.- Nomination (d'un fonctionnaire) ; affectation à un poste.
- 5.- Préfixe péjoratif.- Ephèbe.
- 6.- Feuillet (3ème partie de l'estomac des ruminants (s.f.) (Ne se trouve que dans le P.I.V.).- Préfixe qui marque la répétition.- Suffixe qui sert à former des nombres fractionnaires.
- 7.- Fainéant (s.f.) (Pronom indéfini + radical verbal + terminaison de partici-

pe présent.-

- 8.- Goutte (s.f.).- être différent, autre (Ne se trouve que dans le P.I.V.).
- 9.- Ululer, crier en parlant d'un oiseau de nuit, au passé.- Une fois, jadis, un jour prochain.
- 10.- Accablé de douleur, affligé (2 radicaux).

Verticalement.

- 1.- Cabine téléphonique (2 radicaux) (s.f.).
- 2.- Anonymement.- Allo ! (au téléphone).
- 3.- Avion à réaction.- Angle (s.f.)
- 4.- Un professionnel, un homme de métier.
- 5.- Suffixe verbal transformant un verbe intransitif en verbe transitif.- Au centre d'un *récif-Morpion* (s.f.).
- 6.- Sincère.- Les deux-tiers de "sept".
- 7.- Symbole chimique du tantale.- Ibérique.
- 8.- Action.- Autrement.
- 9.- Neveu.- Possessif (à l'accusatif) = appartenant à une personne inconnue.
- 10.- Un huit.- Intime.

- o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o -

La miscitajo de Ceceo

La plej grava afero en la vivo ne estas esti saga. Estas, ke la aliaj estu tiaj.

Sacha Guitry
franca komedi-verkisto
(1885-1957)

La fausse citation de Ceceo.

L'important dans la vie, ce n'est pas d'être avisé. C'est que les autres le soient.

Sacha Guitry
auteur de comédies
(1885-1957)

Krucvorteniĝmoj (malfacilaj)

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1									
2					■				
3				■					
4			z					■	
5						■			
6			■						
7							■		■
8									
9				■					
10					■				
11			■						
12					■				
13									

Horizontale :

- 1.- La kunulo dse Robinsono (s.f.).
- 2.- Cefrolulo de fama poemo far Virgilio.- Parto de pregejo.
- 3.- Vertebrulo ... senvosta.- Manko de aero (s.f.).
- 4.- Griaĵo (s.f.).
- 5.- Akva felhava mamulo vivanta en la sudaj maroj (s.f.).- El ia kaŭzo.
- 6.- Ciopova estajo (s.f.).- Briko, ne uzata por konstrui domojn.
- 7.- Sangosucanta parazito, precipe ce hundoj.
- 8.- Senbridan perfor-ton.
- 9.- Kapo de speco de gado, konebla per makulo sur la uinua dorsa nagilo.
- 10.- Posedpronomo.- Malgranda unumasta sipo. (s.f.).
- 11.- Verba finaĵo.- Konstrui kastelojn en aero.
- 12.- Gi anstataŭas punkton en telegramo.- Sur la pinto de kirko.
- 13.- Malsuprenlitiloj.

Vertikale :

- 1.- Lia talento estas ofte kontestata (s.f.).
- 2.- Persono, kies metio estas reloki luksaciitajn membrojn.
- 3.- Ec ne la plej malgranda.- Ne akompanata.- Siberia rivero (s.f.).
- 4.- Konjunkcio montranta logikan sekvon.- Paserforma birdo kun flavaj kaj nigraj koloroj (s.f.).- Gi cirkaŭas la akvoglisilon.
- 5.- Ekstremajo de akso, cirkaŭ kiu rotacias rado (s.f.).
- 6.- Malamuza.- Rilata al mikrobo malkovrita de Neisser en 1879.
- 7.- Nesalakva krustulo, kiu nagas per la dua paro de antenoj.- Ensemblon.
- 8.- Vinberoj.- Oceano.
- 9.- Arabdevenaj masinoj por suprenlevi akvon.- Ejo.

Sfinksido

- o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o -

Pli bone estas paroli nature artefaritan lingvon ol balbuti nenature naturan lingvon.

Citita de Günter Becker
Prezidanto de S.E.L.

Mieux vaut parler naturellement une langue artificielle que d'ânonner artificiellement une langue naturelle.

Cité par Günther Becker
Président de la Ligue espérantiste de Sarre

Streĉu la okulojn !

Malkovru almenaŭ 30 vortojn komencantaj per la litero **B** kies ilustraĵo aŭ ideo troviĝas en la ĉi-suba desegnaĵo.

(Desegnaĵo de Gérard Clam, iomete modifita por adaptigo al Esperanto).

Les jeux d'Armand Jammot
(La ludoj de Armand Jammot)
France-Loisirs, ed.

Ouvrez l'oeil !

Trouvez au moins 30 mots commençant par la lettre **B** dont l'illustration ou l'idée se trouvent dans le dessin ci-dessous.

(Dessin de Gérard Clam, légèrement modifié pour l'adaptation à l'espéranto).

Les jeux d'Armand Jammot
France Loisirs, éd.



Du famkonataj poemoj
tradukitaj
de Gaston Waringhien.

oooOooo

Por montri la virtuozecon de Gaston Waringhien en la praktikado de nia lingvo, ni tuj donos la du tradukojn, rimantajn, kiujn li faris du du famkonataj poemoj.

Feliĉa sorto, kiel Ulises multvojaĝa
aŭ kiel konkerinto de la ŝaflano ora,
reveni fine hejmen, kaj dum vivresto glora
inter parencoj vivi, pli sperta kaj pli saĝa.

Ve, kiam fumon vian, kameno hejmvilaĝa,
mi vidos gaje fumi, en kiu tempo fora
mi vidos vin, dometo, kaj korto, pli valora
al mi ol tuta reĝa provinco, riĉpejzaĝa ?

Pli plaĉas al mi prapatra domo paca,
ol deĉalacoj Romaj la frunto plej aŭdaca,
pli ol marmora dura l'ardezo fajne blua,

Plia mia Loire galla ol la Tiber' latina,
pli mia Liré eta ol monto Palatina,
pli ol marvento sala la dolĉa mild' Anjua.

Joachim du Bellay (1491-1543)
(La Sapiroj)

El La Nica Revuo, septembro 1955.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

LA KONKERANTOJ DE L'ORO

Kiel girfalkoj flugas el naskiĝejo stala,
Ĉar porti plu l'orgojlan mizeron ili lacis,
Tra Palos de Mogero bandestroj, trampoĵ pasis
Ebriaj de revado heroa kaj brutala.

Por la akir' de l'fora trezor' fabelmetala,
Kiun Cipango fruktas en minoj, ili ĉasis,
Kaj per la alizeoj klinigi mastojn lasis
Al l'okcidenta bordo mistera kaj fatala.

Dum noktoj, en espero de morgaŭoj glorigaj
Lazuro fosforbrila de l'maroj transtropikaj
Ilian dormon sorĉis per loga sonĝ' orita ;

Aŭ ak' celante pluen la blankajn karavelojn,
Ili rigardis sur la ĉiel' neesplorita
El Ocean' profunda soriri novajn stelojn.

José-Maria de Heredia (1842-1905)
(La Trofeoj)

Sonetaro, eld. STAFETO - Kopenhago 1977

Deux poèmes fameux
traduits
par Gaston Waringhien.

oooOooo

Pour montrer la virtuosité de Gaston Waringhien dans le maniement de notre langue, nous allons donner les deux traductions, rimées, qu'il a faites de deux poèmes bien connus. Ci dessous les originaux.

*Heureux qui, comme Ulysse, a fait un beau voyage,
Ou comme celui-là qui conquiert la toison,
Et puis est retourné, plein d'usage et raison,
Vivre entre ses parents le reste de son âge !*

*Quand reverrai-je, hélas ! de mon petit village
Fumer la cheminée, et en quelle saison
Reverrai-je le clos de ma pauvre maison,
Qui m'est une province et beaucoup d'avantage ?*

*Plus me plait le séjour qu'ont bâti mes aïeux,
Que des palais romains le front audacieux :
Plus que le marbre dur me plait l'ardoise fine,*

*Plus mon Loire gaulois que le Tibre latin,
Plus mon petit Liré que le mont Palatin,
Et plus que l'air marin la douceur angevine.*

Joachim du Bellay (1491-1543)
(Les Regrets)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

LES CONQUÉRANTS

*Comme un vol de gerfauts hors du charnier natal,
Fatigués de porter leurs misères hautaines,
De Palos de Moguer, routiers et capitaines
Partaient, ivres d'un rêve héroïque et brutal.*

*Ils allaient conquérir le fabuleux métal
Que Cipango mûrit dans ses mines lointaines,
Et les vents alizés inclinaient leurs antennes
Aux bords mystérieux du monde occidental.*

*Chaque soir, espérant des lendemains épiques,
L'azur phosphorescent de la mer des Tropiques
Enchantait leur sommeil d'un mirage doré ;*

*Ou, penchés à l'avant des blanches caravelles,
Ils regardaient monter en un ciel ignoré
Du fond de l'Océan des étoiles nouvelles.*

José-Maria de Heredia
(Les Trophées)

La Verkaro de Gaston Waringhien.

- O - O - O -

Estas tre malfacile entenigi en unu paĝo la ĉefajn titolojn de verkaro tiom vasta kaj tiom diversa ol tiun de Gaston Waringhien, kiu plenigas 35 paĝojn (465 ĝis 498) en la kolektiva verko *Li kaj Ni*, kompilita okaze de lia okdekjariĝo.

En la franca : Tradukoj (el la angla)

- *La démonologie*, el Ed. Langton - 1951.
- *Les grandes philosophies de l'Orient*, el Fred. Tomlin - 1952
- *Histoire de la civilisation - Tome III*, el Will Durant - 1953.

Kunlaboroj.

- En la laboroj de Gougenheim kaj Benveniste pri *Le français élémentaire* - 1951.
- En *Grand Larousse encyclopédique en 10 volumes* - 1960.

Sennombraj artikoloj en diversaj revuoj, el kiuj *Vie et Langage*.

En Esperanto. Didaktikaj verkoj.

- Kunlaboro en *Plena Vortaro de Esperanto*-1930. en *Enciklopedio de Esperanto* - 1933. en *Plena Analiza Gramatiko* (kun Kalocsay) - 1935 (reverkita en 1980) en *Parnasa Gvidlibro* (1968).
- *ABC d'espéranto pour ceux qui aiment les lettres* - 1946.
- *Suplemento al Plena Vortaro* - 1956.
- *Grand dictionnaire Espéranto-Français* - 1957.
- *Plena ilustrita Vortaro* (cefredaktoro) - 1970.

Tradukoj.

- *La Maksimoj*, el La Rochefoucauld - 1935.
- *La Robaioj*, el Omar Kajam, tradukita el la persa - 1953, kompletigita en 1984.
- *La floroj de l'Malbona*, el Baudelaire (en kunlab.) - 1957.
- *La Himeroj*, el Gérard de Nerval - 1976.
- *La Trofeo*, el José-Maria de Heredia - 1977.

Studajoj.

- *La Renesanca Periodo - Enkonduko, notoj kaj tradukoj* 1977.
- *La Klasika Periodo* (same) - 1980.
- *La Romantika periodo* (same) - 1982.
- *La Mezepoka Periodo* (same) - 1984.

Poeziaj originalaĵoj.

- *Duonvoce*, sub la pseŭdonomo G.E. Maŭra - 1939.
- *Libro de Amo*, sub la pseŭdonomo G.P. Peneter - kunlabore - 1979.

Eseoj.

- Nro I. *Beletro* - 1956 (ampleksigita en 1987, sub la titolo *Beletro, sed ne katedro*).
- Nro II. *Lingvo kaj vivo* - 1959.
- Nro III. *Ni kaj Ĝi - Pri religio kaj Arto* - 1972
- Nro IV. *1887 Kaj la sekvo* - 1980.
- Nro V. *Kaj la ceter' ... nur literaturo* - 1983.

La loko mankas al ni por citi la sennombrajn artikolojn, antaŭparolojn, prezentojn de verkoj (kiel la *Leteroj* de Zamenhof), recenzojn, ktp. kiujn profesoro Waringhien aperigis tie aŭ aliloke.

L'Oeuvre de Gaston Waringhien

- O - O - O -

Il est bien difficile de faire tenir en une page les principaux titres d'une oeuvre aussi vaste et aussi diverse que celle de Gaston Waringhien, qui occupe 35 pages (465 à 498) dans l'ouvrage collectif Li kaj Ni (Lui et Nous) rédigé à l'occasion de son 80ème anniversaire.

En Français : Traductions (de l'anglais).

- *La démonologie*, de Edouard Langton - 1951.
- *Les grandes philosophies de l'Orient*, de Frédéric Tomlin - 1952.
- *Histoire de la civilisation - Tome III*, de Will Durant - 1953.

Collaborations

- aux travaux de Gougeneim et Benveniste sur le Français élémentaire - 1951.
- au Grand Larousse encyclopédique en dix volumes - 1960.

Innombrables articles dans diverses revues, dont *Vie et Langage*.

En Espéranto Ouvrages didactiques.

- *Collaboration au Plena Vortaro de Esperanto* - 1930 à l'Encyclopédie d'Espéranto - 1933 à la Plena Analiza Gramatiko (avec Kalocsay), 1935, remaniée en 1980 au Parnasa gvidlibro (1968).
- *ABC d'espéranto pour ceux qui aiment les lettres* - 1946.
- *Supplément au Plena Vortaro* - 1956.
- *Grand dictionnaire Espéranto-Français* - 1957.
- *Plena ilustrita vortaro (rédacteur en Chef)* - 1970

Traductions

- *Les Maximes*, de La Rochefoucauld - 1935.
- *La Robaioj*, de Omar Kajam, traduits du persan - 1953, complétés en 1984.
- *Les fleurs du Mal*, de Baudelaire (en coll.) - 1957.
- *Les Chimères*, de Gérard de Nerval - 1976.
- *Les Trophées*, de José-Maria de Heredia - 1977.

Etudes

- *La période de la Renaissance - Introduction, notes et traductions* - 1977.
- *La période classique (idem)* - 1980.
- *La période romantique (idem)* - 1982.
- *La période du moyen-âge (idem)* - 1984).

Oeuvres originales en vers

- *Duonvoce*, sous le pseudonyme de G.E. Maŭra - 1939.
- *Libro de Amo*, sous le pseudonyme de G.P. Peneter - en collaboration - 1979.

Essais

- *Nro I - Beletro* - 1956. (augmenté en 1987 sous le titre *Beletro, sed ne katedro*).
- *Nro II - Lingvo kaj vivo* - 1959.
- *Nro III - Ni kaj Ĝi - Pri religio kaj Arto* - 1972.
- *Nro IV - 1887 Kaj la sekvo* - 1980.
- *Nro V - Kaj la ceter' ... nur literaturo* - 1983.

La place nous manque pour mentionner les innombrables articles, préfaces, présentations d'ouvrages (comme les Lettres de Zamenhof), critiques littéraires etc, que le professeur Waringhien a fait paraître ici ou là.

Blinkenbergajoj

Malgranda internacia malspritaĵaro.

Nia leganto, S-ro R.A. Moraud, el St Yrieix, sendas al ni eltranĉaĵon de la katolika revuo "Au delà de ..." (Transe de ...) N-ro 47 de januaro 1992, en kiu Patro S. skribas :

Prefere esti bona judo, bona kristano, bona islamano, kiuj provas akordiĝi, ol hibrida estaĵo, kiu ne plu havas radikojn. Estas vane transloki sur la religian ebenon, la kompatindan eksperimenton pri Esperanto, kiun neniu parolas".

Certe Padre S. pardonpetis sekve al la protesto de S-ro Moraud, konfesante, ke li pekis pro nescio (ankoraŭ unu !) kaj S-ro Moraud diskonigis tiun respondon por, ke Patro S. " ne estu superŝtita de protestoj ".

Konsentite ! Sed malgraŭ la atentigo kiu kuŝas sube de la kolofono de tiu revuo, paĝon 3, dirante : " *Koncernas ĉiu leganto uzi sian propran juĝon kaj apogi sian pripenson tra la tuta informo, kiu estas al li proponata*", se tiu informo estas kripligita, stumpigita, aŭ tendenca, ĉu la leganto ne riskas preni la eldirojn de la respektinda Patro kiel ... evangeliajn vortojn ?

Petit sottisier international.

Notre lecteur, M. R.A. Moraud, de St Yrieix, nous adresse une coupure de la revue catholique "Au delà de..." Nro 47, de janvier 1992 dans laquelle le Père S. écrit ":

Il vaut mieux être un bon juif, un bon chrétien, un bon musulman qui essaient de s'entendre plutôt qu'un être hybride qui n'aura plus de racines. Inutile de transposer sur le plan religieux la triste expérience de l'espéranto que personne ne parle".

Certes le Père S. a fait amende honorable à la suite de la protestation de M. Moraud, avouant avoir pêché par ignorance (encore un !) et M. Moraud de diffuser cette réponse pour que le Père S. "ne soit pas submergé de protestations".

